

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

101-a jaro • n-ro 1216 (7-8) • Julio-aŭgusto 2008

Niaj ĵurnalistoj kongresis en Vilno



**Interlingvistika
simpozio**

**La renesanco
de E-bibliotekoj**

**La trajno
Zamenhof**



Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;

revuo@esperanto.sk

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964

SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,

✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

147 ... Malferme: Lando kaj gazetaro en komuna renoviĝo (Humphrey Tonkin).

148 ... Niaj ĵurnalistoj kongresis en Vilno (stma).

151 ... Interlingvistika Simpozio okaze de la 10-jariĝo de la Interlingvistikaj Studoj UAM (Ilona Koutny).

152 ... Esperanta murpentraĵo solene prezentita (Przemysław Wierzbowski).

153 ... Kalendaro 2008-2009.

157 ... La renesanco de Esperanto-bibliotekoj (Michela Lipari).

158 ... Recenzoj: Hokan Lundberg pri *Dio, psiĉjo kaj mi*. Mikaelo Bronŝtejn pri *Internacia lingvo*.

159 ... Heidi Goes pri *A summary of the World / Un resumen del mundo / Un Résumé du monde / Die Welt in der Zusammenfassung / Resumo de la mondo*.

160 ... Nikola Rašić pri *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj*. Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj.

161 ... Laste aperis.

163 ... Oficiala informilo.

164 ... Veturi per la trajno Zamenhof (Przemysław Wierzbowski). Rezolucio de pola Sejmo pri UEA.

165 ... Esploroj pri UK en Moskvo (Osmo Buller). Francaj esperantistoj en Martigues.

166 ... Forpasoj. IKU-resumoj en la reto (Amri Wandel). 93-a UK: Francio la plej amasa (Osmo Buller).

KOVRILPAĜE: Fine de majo 2008 en la litova ĉefurbo Vilno okazis la unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj (legu pli sur la paĝoj 147-150).

Foto: Choe Taesok

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359 7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): D-ro inĝ. Ranieri Clerici, Via Conte Verde 66, IT-00185 Roma, Italio; ☎ +39 333 255 19 04, ☎ +39 06 97 600 326; ✉ ranieri.clerici@tin.it.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ☎ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524; ✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of], ☎ +56 994521017; ✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.



Lando kaj gazetaro en komuna renoviĝo

La Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, kiu okazis en Vilno, Litovio, de la 26-a ĝis la 30-a de majo, estis signifa el pluraj vidpunktoj. Tiu granda renkontiĝo (la kongresa libro listigis 183 partoprenantojn el 37 landoj) estis financata ĉefe de la litova registaro, kiu evidente vidis la partoprenanton kiel kernan grupon potencie gravan por la eksteraj rilatoj de Litovio. Kiel malgranda ŝtato, kiu kontraŭbatalas la demonojn de sia pasinteco kaj deziras elpaŝi en la novan Eŭropon, Litovio deziras kapti la atenton de la granda mondo. En sia parolado en la unua tago de la kongreso, la redaktoro de la esperantlingva *Litova Stelo*, Vytautas Šilas, citis tutan serion da humuraj eraroj pri Litovio (ĝi estas balkana – anstataŭ balta ŝtato, ĝi estas danĝera ĉar ĝi dividas landlimon kun Rusio, kiu siavice dividas landlimon kun Afganio, ktp.). Ni bele ridis – sed mi devas diri, ke, reveninte hejmen kaj raportante al la homoj, ke mi ĵus estis en Litovio, mi rimarkis geografie iom konfuzitan mienon sur la vizaĝoj de pluraj miaj konatoj.... Kunvenigi redaktorojn de Esperanto-gazetoj kaj Esperanto-parolantajn ĵurnalistojn do havis strategian sencon: ili estas potencialaj amikoj de la renoviĝanta lando.

La voĉo de Litovio estas malgranda voĉo en la internacia medio. Ĝia lingvo estas apenaŭ parolata ekster la litova landlimo; ĝia komplika historio estas malmulte konata; ĝia kulturo malforte registriĝas internacie. Unu el la fortecoj de Esperanto estas ĝia kapablo doni internacian voĉon al tiuj, kiuj malmulte aŭdeblas, interalie al popoloj kiel la litova. Sekve, la litova investo en tiu ĉi kongreso havas sencon.

Se temas pri la lingva dimensio ĝenerale, la mondo apenaŭ komprenas ĝian komplikecon nek ĝiajn implicojn. La kazo Litovio estas bona ekzemplo de la neceso eduki la publikon pri la situacio de malgrandaj popoloj en multlingva mondo. Espereble niaj ĵurnalistoj kaptos tiun okazon. Cetere, se la esperantistaj ĵurnalistoj povus fari el si specialistojn ne nur pri Esperanto sed pri lingvoj kaj lingvopolitiko ĝenerale, ili povus doni pli objektivan bildon ne nur pri la situacio de malgrandaj landoj kiel Litovio sed ankaŭ pri la pretendoj de Esperanto kiel internacia ligilo de homoj, kiuj parolas malsamajn lingvojn.

La kongreso estis mejloŝtona ankaŭ ĉar ĝi reprezentis novan specon de kunlaboro inter landa asocio, nome la Litova Esperanto-Asocio, kaj internacia Esperanto-organizaĵo, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Krom se temas pri

organizado de Universalaj Kongresoj, landaj Esperanto-asocioj relative malofte elpaŝas por engaĝiĝi en la organizado de la internacia Esperanto-movado, kiu tamen estas la pravigo de ilia ekzisto. Organizante kongreson por restarigi iaman fakan Esperanto-asocion, kiu enfalis periodon de dormado aŭ eĉ malfondo, LEA, sub gvido de sia strategie gimnastika prezidanto Povilas Jegorovas, ligis rimedojn el ekster la Esperanto-movado al bezono ene de la Esperanto-movado – nome revivigo de faka asocio.

Ne temas pri kiu ajn faka asocio, sed pri asocio, kiu povus ludi fundamente gravan rolon. En diaspora komunumo kiel la nia, kies membroj loĝas en ĉiuj anguloj de la terglobo, la skriba kaj parola gazetaro (se ni rajtas tiel nomi ĝin) ludas fundamentan rolon. Je plej fundamenta nivelo ĝi estas inter la plej gravaj instruiloj kaj unuigoj de la lingvo Esperanto. Ĝi estas ankaŭ la ĉefa kanalo de informoj, la ĉefa vojo por kunigi la esperantistojn en komunan laboron. En la nuna tempo de revoluciaj teknologiaj ŝanĝiĝoj, la estonteco de la Esperanto-gazetaro estas malklara: nepras, ke ĝi bone interpretu kaj selektive utiligu la novajn komunikajn rimedojn – kaj sekve gravas, ke la redaktoroj de niaj gazetoj interkonsiliĝu por plani kunlaboron kaj interŝanĝi spertojn.

En Vilno la reprezentiĝo de Esperanto-redaktoroj estis impona. Interalie partoprenis la ĉefredaktoroj ne nur de revuo

Esperanto sed ankaŭ de *Heroldo de Esperanto*, *La Ondo de Esperanto*, *Literatura Foiro*, *Pola Radio*. Pluraj redaktoroj de landaj Esperanto-revuoj ĉeestis, inter ili tiu de la elstara *Le Monde de l'Espéranto*. La reton reprezentis ano de la redakta stabo de la reta *El Popola Ĉinio*, la redaktoro de la nova reta revuo *Freŝo*, kaj la firme establita reta revuo *Libera Folio*.

Simple arigi tiom da influaj personoj en la sama loko kaj lasi ilin babili estis jam granda atingo. Kiel „reĝisoro” de la kongresa temo, do gvidanto de la diskutoj, mi estis kontenta pri la farita progreso kaj pri akcepto de la kongresaj konkludoj. Nun restas du demandoj: Ĉu la neformala kontakto inter la diversaj redaktoroj daŭros, kaj Ĉu la nove starigita TEĴA sub prezido de Audrys Antanaitis kapablas starigi kaj plenumi ambician planon de agado dum la venontaj jaroj? Ni esperu, ke jes, ĉar signifa parto de nia vivo kiel esperantistoj dependas de tio.

Humphrey Tonkin



Niaj ĵurnalistoj kongresis en Vilno

Litova Ĵurnalista Asocio kaj Litova Esperanto-Asocio, kun subteno de litoviaj aŭtoritatoj, okazigis en la tagoj 26-30 majo 2008 en la litova ĉefurbo Vilno la unuan internacian kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj.

Al la kongreso, kies ĉeftemo estis „Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto“, aliĝis 183 personoj el 37 landoj. La kongreso okazis en la malnova historia urbodomo de Vilno kaj en la Konstitucia salono de la litovia parlamento, kie estis subskribita la nova konstitucio de Litovio. La prezidanto de la litovia parlamento, Česlovas Juršėnas, persone bonvenigis la kongresanojn en la Konstitucia salono, kaj vespere regalis ilin en parlamenta restoracio, kie li transdonis oficialan gratulleteron al la novelektita prezidanto de TEĴA, la populara litova radia ĵurnalisto Audrys Antanaitis.

Dum la kvin fekundaj printempaj kongresaj tagoj, kiujn kune pasigis niaj ĵurnalistoj, okazis tuttaga ekskurso tra Vilno kaj Trakai, solenaj malfermo kaj fermo, akceptoj ĉe la urbestro, ĉefministro kaj parlament-prezidanto, laborkunsidoj pri la kongresa temo, kunsidoj de TEĴA kaj kvindeko da valoraj raportoj kaj prelegoj: *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto* (H. Tonkin); *Amaskomunikado en Litovio* (A. Antanaitis); *Zamenhof kaj la gazetaro* (A. Korĵenkov); *100 jaroj de la revuo Esperanto* (S. Marček); *Kontribuo de Litova Stelo al formado de bildo pri la lando* (P. Čelīauskas); *Edmond Privat (1889-1962) – la patro de la moderna Esperanto-ĵurnalismo* (T. Chmielik); *Informado*

en lingvistikaj medioj (D. Blanke); *De nediskriminacio lingva al aŭtenta lingva hom-raĵto* (R. Clerici); *Tradicia percepto de la planlingva demando far la svisa gazetaro* (A. Künzli); *Japana ĵurnalisto pri ĉeĥa kulturo per Esperanto* (J. Celetka); *Eblecoj kaj formoj de kunlaboro de malgrandaj E-gazetoj* (D. Janičić); *E-ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj* (J. Pleadin); *Ryszard Kapuściński (1932-2007) – la majstra ĵurnalisto pri la mondo pereanta* (T. Chmielik); *Kiel Esperanto ĵurnalistigis min?* (A.R. Mamduhi); *Kiel funkcias la cenzuro en la Esperanto-gazetaro* (G. Silber); *Kiel adapti fizike presitan revuon al ret-konekta mondo* (S. MacGill); *Uzado de modernaj teknikoj en informado* (J. Gaus kaj P. Baláž); *Perkomputila teksto-prilaboro por ĵurnalistoj kaj redaktoroj. Komputilo ne estas antikva skribmaŝino* (K. Leja); *Dek kvin jaroj forpasis de kiam silentas E-programoj de Kroata Radio* (V. Jurković); *Novaj interretaj teknologioj kaj E-movado* (J. Li); *La situacio de Esperanto-gazetoj en Germanio* (A. Schubert); *Komputeke* (Y. Nevelsteen); *Specifeco de la interretaj elsendoj en la Internacia lingvo – novaj defioj por la radiofonio kaj novaj eblecoj por la movado?* (G. Kosiarska kaj M. Jaskot); *Aŭtoraj rajtoj en EU* (P. Chrdle); *Interligo de naciaj literaturoj kaj Esperanto kiel literatura medio* (Z. Martinov); *Porlaborista E-gazetaro* (D. Rooke);



Esperanto kaj kulturoj en Afriko (F.A. Badu); *Kultura politiko de kulturaj periodaĵoj /laŭ la sperto de la revuo Literatura foiro/* (L. Trifončovski); *Senpagaj novaĵ-gazetoj por labor-pendolantoj – revolucio en Eŭropo kaj en la svisa amaskomunikilaro* (A. Künzli); *Malfacilaĵoj kaj ebloj por enmerkatiĝi por-junularan kaj por-komencantan revuon kaj teni ĝin aktuala kaj alloga por nuntempaj junuloj* (S. MacGill); *Nova retprojekto Esperanto-Aktuale* (J. Gaus kaj P. Baláž); *Kunlaboro kun la amaskomunikiloj – strategio, rimedoj* (A. Junusov); *Nuntempaj defioj al internacia ĵurnalismo* (J. Pietiläinen); *Interreto: La defioj de tuj-ĵurnalismo* (I. Ertl); *Konformismo en la Esperanta gazetaro* (K. Kniivilä); *Esperanto – mia profesia pontolingvo* (R. Dobrzyński); *Reflektiĝo de la specifa E-kulturo en publicistiko* (A. Melnikov). *Esperantlingva radiofonio en interkultura komunikado – sojle de la 50-jariĝo de E-elsendoj de Pola Radio* (B. Pietrzak); *Kiel koncepti la magazinon?* (C. Nourmont). *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto* (Á. Máthé); *Konsideroj pri la Kongresa Gazetara Servo* (G.C. Fighiera); *Rolo de Esperanto en la nuntempa mondo* (F.A. Badu); *Esperanto: Malamiko*



Foto: Gintautas Salnionis

La nova TEĴA-estraro: Mariana Evlogieva, Dieter Rooke, Aleksandr Korĵenkov, Audrys Antanaitis (prezidanto), Kalle Kniivilä kaj Vytautas Šilas (ĝenerala sekretario).

aŭ amiko de plurlingveco (S. Ó Riain); *Memreguligo kaj etiko en ĵurnalismo* (J. Pietiläinen); *Virinaj voĉoj en la Esperanta gazetaro* (P. Martinelli); *La estonteco de esperantlingvaj gazetoj* (A. Schubert); *La kontribuo de la DIPLO al la Esperanta ĵurnalismo* (V. Lutermano); *Ĵurnalismo en kaj ekster Esperantujo: paraleloj kaj kontrastoj* (A. Muhlemann); *Informado pere de Disvastigo* (G. Bronzetti).

Konkludoj kaj rekomendoj

La ĉi-subaj konkludoj kaj rekomendoj rezultis el la dumkongresa diskutado. Ili celas aplikiĝi laŭeble al ĉiuj medioj (periodaĵoj, retaj gazetoj, radio, televido k.s.) kaj ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj. Ili neniel povas esti konsiderataj kiel kompletaj aŭ definitivaj, nek kiel unu kohera plano, sed kiel komenca paŝo en pli bona mastrumado de la rilatoj kun la ĝenerala publiko kaj ankaŭ specife kun la Esperanto-publiko.

Principoj

1. La Esperanto-gazetaro kaj Esperanto-radio (inkluzive de retaj gazetoj kaj radiostacioj) estas gravaj iloj por la kultivado de la lingvo Esperanto. Redaktoroj faru ĉion eblan por mem utiligi la lingvon bone, evoluigi la lingvon, kaj stimuli bonan uzadon inter la legantoj kaj aŭskultantoj, ankaŭ instigante ilin legi kaj alimaniere uzi la lingvon.

2. Redaktoroj faru ĉion eblan por informi sian legantaron (aŭ

aŭskultantaron) pri Esperanto, ĝia lingva komunumo, kaj la Esperanto-movado, tiel ke ili fariĝu kiel eble plej efikaj rolantoj en la Esperanto-movado kaj Esperanto-kulturo.

3. Por ke Esperanto-gazetoj estu bibliografie registritaj kaj konservataj, redaktoroj ĉiam (1) klare notu en ĉiu numero bazajn bibliografiajn informojn (numero, jarkolekto k.s.), (2) asigu al sia gazeto ISSN, (3) sendu ĉiun numeron senpage almenaŭ al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj la Biblioteko Hodler en Roterdamo, kaj (4) arkive konservu ĉiun malnovan numeron en elektronika formo, prefere en retpaĝaro libere alirebla.

4. Same grave estas certigi, ke malnova materialo ne perdiĝu, sed trovu sian lokon en granda biblioteko aŭ arkivo. Tiu ĉi strebo al konservado aŭ konservigo de historia Esperanto-materialo estas grava devo de ĉiu Esperanto-organizaĵo.

Rimedoj

5. Mankas unu aŭtoritata loko en la reto, kien oni iru por ricevi bazajn datumojn pri Esperanto. Rekomendindas krei tian datumbazon, eventuale en la nun konstruata paĝaro *Esperanto-Aktuale*.

6. Kvankam troveblas jen kaj jen tiaj informoj, mankas loko en la reto al kiu oni povu facile sin turni por trovi bonajn argumentojn por Esperanto, modelajn gazetarajn komunikojn, kaj similajn faciligilojn por tiuj, kiuj verkas gazetarajn komunikojn aŭ artikolojn por la ekstera publiko, aŭ laboras en radio aŭ televido, aŭ ĉe la reto. Indus krei tian lokon.

Praktikoj kaj agadoj

7. Plej ofte, mankas en nacilingvaj redakciaj staboj personoj, kiuj estas fakuloj pri lingvoj, lingva politiko k.s. Laŭeble, esperantistoj, kiuj estas samtempe profesiaj ĵurnalistoj, klopodu eduki sin tiel, ke nature tiuj redakcioj turnu sin al ili se leviĝas demandoj pri lingva politiko, la lingva dimensio de difinitaj novaĵoj, k.s.

8. Unu speco de ĵurnalisma laboro estas la pretigo de artikoloj kaj gazetaraj komunikoj pri la Esperanto-komunumo por apero en nacilingvaj amaskomunikiloj. La tasko konsistas el elektado de novaĵoj kaj de bazaj informoj, trejnado de intervjupartneroj, kontaktado de nacilingvaj gazetoj, radio, televido, novaj agentejoj kaj retgazetoj ĝis fine la kontrolado de la rezultoj. Esperantlingvaj ĵurnalistoj laŭeble helpu en tiu amaskomunikila laboro kaj ĝia establo kiel regula kaj altnivela ero de Esperanto-agado.

9. Tiucele, TEĴA konsideru la eblon starigi programon de seminarioj pri kontaktoj kun la gazetaro, organizeblaj en Esperanto-aranĝoj, en la Kleriga Tago en Universalaj Kongresoj k.s. Specife, rilate al Universalaj Kongresoj, UEA, en kunlaboro kun TEĴA, organizu seminarion pri kontaktoj kun la gazetaro, por ĉiu LKK kaj ties helpantoj, jam kelkajn monatojn antaŭ ĉiu UK. TEĴA ankaŭ proponu siajn servojn al la Gazetara Servo de ĉiu UK.

10. Planante Esperanto-aranĝon, la organizantoj nepre konsideru la publikrilatan aspekton de tiu aranĝo jam en la komencaj stadioj de planado – precipe la rilatojn kun la gazetaro k.s. Ili utiligu la helpon de spertaj ĵurnalistoj laŭeble.

11. En lastaj jaroj la teknologio kaj aliaj evoluoj kondukis al profundaj ŝanĝoj en la fluo de informoj al la publiko. Neniu redaktoro povas respondece ignori elektronikajn rimedojn. Baza plana prioritato devas esti klopodo eltrovi la ĝustan ekvilibron inter presa eldonado unuflanke kaj reta informado aliflanke. Gravus ankaŭ, ke redaktoroj konsideru utiligi la diversajn faciligajn rimedojn nun haveblajn, ankaŭ en Esperanto, por redaktado, kontrolado kaj cirkuligado.

12. La Esperanto-gazetaro estas malforta kaj dise lokita kompare kun la gazetaro en multaj aliaj lingvoj. Sekve, aparte gravas maksimuma kunlaboro inter gazetoj k. s.

– ekde simpla interŝanĝo de informoj tra kunlaboro en la produktado de materialoj ĝis kompleta kunfandiĝo. Aperigi gazeton simple por aperigi ĝin, aŭ funkciigi radiostacion simple por ĝin funkciigi, ne sufiĉas: ĝi estu maksimume utila kaj vivkapbla.

13. TEĴA serĉu kunlaboron kun aliaj internaciaj ĵurnalistaj organizaĵoj, ne nur kiel subtenanto de Esperanto sed ankaŭ kiel organizaĵo kun specialaj scioj pri lingvaj demandoj ĝenerale – kaj por kapti spertojn utilajn al la Esperanto-gazetaro.

14. TEĴA faru sian eblon certigi, ke bona kaj utiligebla materialo regule fluu al la diverslanda gazetaro, proponante sian helpon al internaciaj kaj landaj Esperanto-organizaĵoj, stimule inter siaj membroj la verkadon de artikoloj kaj komunikoj, kaj intervenante kiam aperas utiligeblaj okazoj por informi la publikon pri Esperanto kaj rilataj temoj.

Financo

15. Redakcioj kaj aliaj koncernaj organizaĵoj faru ĉion eblan por certigi, ke Esperanto-gazetoj estu facile aboneblaj, ke unuopaj numeroj estu aĉeteblaj ekzemple en Esperanto-aranĝoj, kaj ke la merkatura flanko de la aperigo kaj daŭrigo de ĉiu gazeto ricevu adekvatan atenton.

16. En diversaj mondopartoj, sed precipe en EU-landoj, povas ekzisti fontoj de subvencioj por unuopaj gazetoj aŭ por diverslanda kunlaboro inter gazetoj. Redakcioj sisteme esploru tiujn eblojn kaj TEĴA instigu ilin tion fari.



Audrys Antanaitis, la nova prezidanto de TEĴA, estas ankaŭ vicprezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio (LĴA). Kune kun Dainius Radzevičius, la prezidanto de LĴA, li pretas labori por starigo de konkreta kunlaboro inter TEĴA kaj Internacia Federacio de Ĵurnalistoj. Krom Audrys Antanaitis en la nova estraro de TEĴA estas Mariana Evlogieva (Bulgario), Kalle Kniivilä (Svedio), Aleksander Korjenkov (Rusio), Dieter Rooke (Svislando) kaj Vytautas Šilas (Litovio).

La estraro antaŭ la julia membrokunveno en Roterdamo, kadre de la 93-a UK, pretigos statutajn amendojn por jura registrado de la asocio, starigos proprajn retejon kaj diskutliston, kaj invitos ĉiujn esperantistajn ĵurnalistojn, amatorajn kaj profesiajn, al membriĝo kaj kunlaboro en la renovigita TEĴA.

Utilaj kontaktoj: Retpaĝaro de TEĴA: www.tejha.org. Sekretario de TEĴA Vytautas Šilas: litovastelo@takas.lt. Aliĝilo al TEĴA: www.tejha.org/?page_id=7. Pliaj informoj pri la kongreso: www.esperanto.lt. (stma)



La prezidanto de la litovia parlamento, Česlovas Juršėnas, persone bonvenigis la kongresanojn en la Konstitucia salono.

Interlingvistika Simpozio okaze de la 10-jariĝo de la Interligvistikaj Studoj UAM



La postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj – oferto de la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań – stabiligis dum la pasintaj 10 jaroj. Ili altiras studemulojn el proksimaj kaj foraj landoj: la lastan grupon konsistigis komence 26 gestudentoj el 13 landoj de Pollando kaj Germanio ĝis Japanio kaj Irano. La altan nivelon de la kursoj certigas la prelegantoj el diversaj universitataj medioj kaj specialistoj de sia tereno.

La tri-jara studprogramo (kun surlokaj intensaj kursoj kaj retaj konsultiĝoj) disponigas solidan bazon el la tereno de lingvistiko kaj komunikado, el esperantologio, interlingvistiko kaj E-kulturo (komparebla kun filologiaj studoj por fremdaj lingvoj). La multnacia partoprenantaro nature kontribuas al la interkulturaj kaj kontrastaj studoj. La specialiĝo en la tria jaro pri instruado de Esperanto kontribuas al la formado de instruistoj kun vasta horizonto kaj taŭgaj praktikaj konoj. Ankaŭ interesigantoj pri aliaj terenoj kiel diskutataj problemoj de E-lingvistiko aŭ interlingvistiko povas pliprofundi siajn sciojn.

La ĉi-septembra sesio estos eksterordinara pro tri kaŭzoj: 1) jam la tria grupo finos siajn studojn; 2) okazos interlingvistika simpozio por festi la 10-jariĝon de la fako kun riĉa programo dank' al niaj prelegantoj (inter ili Vera Barandovská, Detlev Blanke, Tomasz Chmielik, Michel Duc Goninaz, István Ertl, Sabine Fiedler, Aleksander

Korjenkov, Katalin Kováts, Maria Majerczak, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin, John Wells) kaj niaj eksaj kaj nunaj gestudentoj. Por la okazo pretiĝas la unua studlibro (pri kulturo kaj komunikado) kaj la germana-Esperanta-pola versio de la ampleksigita *Etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado en la esperantologia metiejo*, al kiu kontribuas kursgvidantoj kaj partoprenantoj.

Ĉiuj interesigantoj pri esperantologio kaj interlingvistiko estas bonvenaj por festi kun ni (18-19.09.2008, aliĝo ĉe la suba adreso). Ili povas daŭrigi la restadon en Poznań per la agrabla kultura programo de Arkones dum la semajnfino (19-21.09.2008, www.arkones.org).

La tria evento estas la starto de la nova grupo, al kiu aliĝantoj, kiuj jam bone parolas la lingvon kaj havas universitatan diplomon, estas ankoraŭ atendataj ĝis la 15-a de aŭgusto. La novaj gestudentoj povos partopreni krom siaj kursoj (pri fonetiko kun J. Wells, pri kulturo kun A. Melnikov kaj Z. Galor, pri literaturo kun L. Ligeza kaj T. Chmielik, pri komunikado kun I. Koutny) ankaŭ la suprajn aranĝojn. Por ilia tria jaro specialiĝoj pri tradukado kaj interkultura komunikado estas planataj krom la konstanta oferto de instruado de Esperanto. La stipendioj de ESF ebligas la partoprenon de kelkaj gestudentoj kiel ĝis nun.

La unujara instruista trejnano organizata kune kun ILEI same atendas aliĝantojn. UAM kaj ILEI subskribis kontrakton por kunlaboro en la formado de E-instruistoj. La partoprenantoj povos profiti el ĉiuj menciitaj aranĝoj.

Ilona Koutny

gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Pliaj informoj kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl,

www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html.



Fotioj: la aŭtoro



Esperanta murpenetraĵo solene prezentita

**La 5-an de junio Osmo Buller
oficiale prezentis al bjalistokanoj
murpenetraĵon, kiu troviĝas ĉe la strato
Zamenhof, en la loko, kie antaŭe staris
la naskiĝdomo de Ludoviko.**

La trajno „Zamenhof“ (legu sur la p. 164, rim. de la red.) kaj tiu ĉi penetraĵo, estas atestoj de granda engaĝiĝo de bjalistokanoj, diris Buller. Li certigis, ke la venontjara Universala Kongreso, organizata en Bjalistoko pro la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, estos granda evento.

La granda fresko sur muro de socrealisma konstruaĵo estis preparata de bjalistoka artisto Andrzej Muszyński, ekde la 23-a de aprilo, kio daŭris unu monaton. Por preparo de la muro, specialaj farboj kaj pentrado, pagis la urbestro. Jam fine de majo multaj preterpasantoj povis paroli pri pozitiva ŝanĝo de la aspekto de la strato dank' al la neordinara dekoraĵo.

Kiel ĝi aspektas? La bildo havas grandecon de tri etaĝoj kaj estas farita per tekniko imitanta verajn objektojn. Ĉe la unua etaĝo, en malfermita fenestro, oni povas vidi Jakobon Ŝapiro – intermilitan gvidanton de la bjalistoka E-movado, ĵurnaliston, „motoron“ de ĉiuj poresperantaj agadoj en la urbo kaj ĝia regiono, ekz. nomo de la strato Zamenhof. Li sidas kun sia amiko, Abraham Zbar, kaj ambaŭ viroj sur piedoj la tenas ĉapelojn. Tiu ĉi parto estas projektita surbaze de malnova foto montranta la saman situacion. Super ili, sur balkono, staras Ludoviko Zamenhof mem, apogate de barilo, penseme rigardante ĉirkaŭaĵon de la strato, kiu ricevis lian nomon.

En la plej supra parto estas alia balkono kun personoj tute modernaj: jen ridantaj infanoj, junaj loĝantoj de la urbo, tenantaj balonojn „en kvin koloroj de la olimpia flago; ili



simbolas la ideon popularigi Esperanton en la tuta mondo“, kiel klarigas la artisto. Okaze de la laboro, oni demetis la informtabulon pri la naskiĝo de Ludoviko, por ke ĝi ne difektiĝu dum la pentrado. Ĉar ĝi jam estas malnova, aperis do okazo ĝin renovigi kaj poste remeti en la saman lokon.

Przemysław Wierzbowski

Fotoj: Mateusz Hołownia kaj Peter Baláž

Sur la fotoj: Supre: la penetraĵo. Maldekstre: la urbestro kun esperantistoj kaj junaj loĝantoj de la urbo. Dekstre sube: Barbara Pietrzak, Clay Magalhães, la aŭtoro kaj Osmo Buller.



Kalendaro 2008 – 2009



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembra numero.

julio

01-10: Internaciaj aranĝoj Turismo, kulturo, historio en Carevo, hotelo Panorama ĉe la Nigra Maro en Bulgario. ✉ Inĝ. Boris Gaĝanov, Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad, Bulgario. ☎ 0035935954204; 📠 00359898676270. 📧 gadzanov_b@abv.bg; www.elmis.hit.bg aŭ www.panorama.v-tsarevo.info.



01-10: IET-1, Internaciaj Esperanto-tagoj. Ĉemaraferia kaj studa aranĝo, kunorganizata de rusiaj kaj ukrainiaj e-istoj. ✉ Zajdman Jefim Semjonoviĉ, ul. Kirova 26-14, UA-98600 Jalta, Ukrainio. ☎ +380964388585. 📧 jefim_z@mail.ru; Andrej Grigorjevskij, andreo@reu.ru; http://esperanto.net/iet2008/.

03-06: 67-a Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Cuenca, Hispanio. 📧 alejandro.pareja@gmail.com; www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=155&Itemid=179.

05-12: 44-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-44, en Ventspils, Latvio. ✉ Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio. ☎ +37126407174 (Margarita Želve); +37167383461, +37128486628 (Birutā Rozen-felde). 📧 margarita.zelve@gmail.com; www.esperanto.org.lv/.



05-12: Staĝo en kastelo Grezijono, 1-a grado: Steve Wagenseller, Usono; 2-a grado: Michel Dechy, Francio; 3-a grado: Serge Sire, Francio. Aktivajo: korusa kantado kun Franjo Provost. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono, FR-49150 Baugé, Francio.

☎ +33-2.41.89.10.34. 📧 http://gresillon.org/kastelo@gresillon.org.



06-13: Internacia Somera E-Kurso en Lesjöfors, Vermlando, Svedio. Kursoj en tri niveloj plus infana grupo, agrablaj vesperoj, naturtravivaĵoj, ekskurso. ✉ Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors. ☎ 0046590-30909. 📧 www.e-g.se/; egarden@esperanto.se.

07-11: Biblia Semajno en ICH Herzberg (aliĝo ĉe pastro Eichkorn). ✉ ICH, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagen str.6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983. 📧 www.ic-herzberg.de/; esperanto-zentrum@web.de.

07-14: IRIS-Festivalo kaj 35-a Hungaria Esperanto-Kongreso en Szolnok. 📧 http://iris.eszperanto.info/; mesz@eszperanto.info aŭ esperantohea@t-online.hu.



08-12: Praktikado de la lingvo (2-a grado) en Kvinpetalo. ✉ Kvinpetalo, rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio. 📧 http://www.kvinpetalo.org; johana-esperanto@orange.fr.

09-15: Armenia Somero en Jerevan. Ekskursoj, ripozado, prelegoj kaj kultura programo. ✉ Levon Davtyan, ldvtlsd@yahoo.com.

11-13: Esperanto-tagoj Wörgl. Interregiona Renkontiĝo. Koncerto de Attila Schimmer, reteja projekto „vivomondo“, jarkunveno de A-E-Federacio. Kunveno kaj loĝejo: Hotel Alte Post, Andreas-Hofer-Platz 2, AT-6300 Wörgl, Aŭstrio. ✉ Aŭstria E-Federacio, Postfach 39, AT-1014 Wien, Aŭstrio. 📧 aef@esperanto.at.

11-14: 56-a ELNA-Kongreso, Montrealo, Kanado. ✉ Esperanto-Ligo por Norda

Ameriko, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. 📧 www.esperanto-usa.org/; eusa@esperanto-usa.org.

11-14: Diversaj aktivaĵoj en Kulturvilaĝo en Västerås, Svedio, apud la lago Mälaren. En tendo oni donos enkonduk-lecionojn, E-muzikistoj provludos por granda koncerto la 15-an de junio. Ludos La Perdita Generacio, Ĵomart, Nataša kaj Carina, Mehdi Martin Strid, Kaj Stridell kaj Kim Henriksen. 📧 w.posthuma@esperanto.se.

11-18: 74-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Premantura, Kroatio. ✉ Antun Kovač, Bisačka 5, HR-1000 Zagreb, Kroatio. 📧 antun.kovac@mzopu.hr.

11-19: Kultur-turisma semajno antaŭ la UK en Roterdamo, kun komuna festado en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, okaze de la dua datreveno de la akcepto de la oficiala Esperanta kromnomo. Abunda kultura kaj turisma programo, festo de flagoj, urba festo. ✉ (v. 07 jul). 📧 http://esperanto-urbo.de.

12: Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso pri fiŝista supo, kun partopreno de esperantistoj. ✉ Székely Csaba, ☎ +36303032386 kaj +36703336111. 📧 www.bereczki-baja.sulinet.hu/esper/fishsup/; bajai@eposta.hu.

12-16: 43-a Brazila Kongreso de Esperanto, 28-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso kaj 7-a Infana Kongreseto de Esperanto en Fortaleza, la ĉefurbo de la ŝtato Cearao, en la nordoriento de Brazilo. ✉ José Roberto Alves de Albuquerque/LKK, 📧 http://esperanto.org.br/p/; jrobertoalvesbr@yahoo.com.br.

12-18: Internacia Esperanto-Konferenco 2008. La temo: *Fernando de Diego – la vivo kaj verkoj.* Elektito de la OSIEK-premio okazos en Nova Gorica, Slovenio. 📧 eric@laubacher.fr; ed.borsboom@versatel.nl.

Sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

TAKE7

12-18 de julio 2008
Montrealo, Kanado

**Ekosistemoj
Lingvoj
Kulturoj**

Diverseco por daŭripova evoluiĝo en la Amerikoj

www.take7.ca

12-18: 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. ✉ TAKE-ESK, 6358-a, rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8. 📧 www.take7.ca/; informo@take7.ca.

12-19: 3-a Internacia Konferenco de Internacia Naturkuraca Asocio



en Herzberg, Germanio. Temo: „Herbokuracado en Oriento kaj Okcidento“. ✉ Harald Schicke, Schoolbrink 12, DE-27383 Hetzwege, Germanio. ☎ +49(0)426394087, 📠 +49(0)426394088. 📧 MZVerlag@web.de. aŭ INA: ina-asocio@web.de.

12-19: Staĝo en kastelo Grezijono, 1-a grado: Steve Wagenseller, Usono; 2-a grado: Jean-Luc Kristos, Francio; 3-a grado: Renée Triolle, Francio. Aktivajo: kantado-dancado, pied-masaĝado. ✉ Grezijono (v. 05 jul).

13-18: 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Krakovo, Pollando. ✉ Zakład Opieki Zdrowotnej, Ośrodek UMEA, Shinoda-Kuracejo, os. Alertyńskie 1-2., PL-31-851 Kraków, Pollando. 📧 umea@interia.pl; <http://umeaopoka.republika.pl/>.



13-26: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭlektu instruado de lingvo. ✉ Věra Podhradská, Poříčí 1/801, CZ-603 00 Brno, Ĉeĥio. 📧 podhradska@volny.cz.

15-19: Konferenco de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo en Rotterdam. ✉ Dieter Rooke, Äusserer Klus 14, CH-4702 Oensingen, Svislando.

19-25: 20-a Internacia Junulara Semajno en la urbo Tab (apud Balatono), Hungario. ✉ Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. 📧 <http://www.ijs.hu>, ijs@ijs.hu. Senpaga/duonpaga partopreno por 2 personoj pere de Premio Melinda. : www.esperanto.hu/eventoj/melinda.htm.



19-26: 93-a Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo, Nederlando. ✉ (v. la kolofono). 📧 http://uea.org/kongresoj/uk_2008.html; info@uea.org.

19-26: IIK, 39-a Internacia Infana Kongreseto en Oostvoorne apud Rotterdam, Nederlando. ✉ Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. 📧 bertox@free.fr; <http://bertosch.free.fr/iik2008/index.html>.

19-26: Staĝo en kastelo Grezijono, 1-a grado: anoncota, vidu la retejon, 2-a grado: Jean-Luc Kristos, Francio; 3-a grado: André Cherpillod, Francio. Aktivajoj: pentrado, desegnado. ✉ Grezijono (v. 05 jul).

26 jul - 02 aŭg: SEFT 2008, Somera Esperanta Familia/Feria Tendaro kiel postarango de la UK en Nederlando. Ordinara tendejo, nordorienta Germanio, apud la Meklenburgia lagaro. Libera kunestado en la naturo inter lingvoamikoj. ✉ GEA, landa asocio MA, Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/0705, DE-17034 Neubrandenburg. 📧 info@esperanto-nb.de.

26 jul - 02 aŭg: Renkonto de Esperantistaj Familioj (REF) en Grezijono, Francio. ✉ Bert Schumann, ☎ +33-2.99.83.69.86. 📧 bertox@free.fr.



26 jul - 02 aŭg: IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely, Hungario. La kongresa temo estos „Minoritataj rajtoj – individuaj kaj kolektivaj“. ✉ LKK de IJK 2008, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. ☎/📠 +3612828885. 📧 <http://esperanto.net/ijk2008/>; hej@eszperanto.hu (atentu pri la hungara skribmaniero de „eszperanto“ ĉe la retadreso).

27 jul - 04 aŭg: Kristana Kongreso, 58-a Kongreso de KELI en hotelo Esperanto en Pribylina, Slovakio. ✉ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. 📧 polnický@quick.cz.

27 jul - 09 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭlektu instruado de la lingvo. ✉ (v. 13 jul).



29 jul - 08 aŭg: 41-a ILEI-Konferenco en Portonovo, Benino, Afriko. 📧 www.ilei.info, www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php; aidute@mail.lt.

29 jul - 16 aŭg: Muzika staĝo en Kvinpetalo, Francio. Kantoj, horoj, orkestra muziko, realigo de KD. ✉ (v. 08 jul).

aŭgusto

01-17: SOMERE – Somera mezeŭropa renkontiĝo en Kall-Krekel, Germanio. ✉ EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wickestr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49306855831. 📧 somere5@esperantoland.org; www.esperantoland.org/somere/.



02-08: MIRO (Magiverda Internacia Renkontiĝo), Duga Resa, Kroatio. Tuj post kaj proksime al IJK venu amuziĝi en beleaga verda naturo. ✉ Kneza Mislava 11/IV, HR-1000 Zagreb, Kroatio. 📧 kajulino@gmail.com aŭ tina.tisljar@gmail.com; www.keja.hr/.

02-09: Staĝoj en kastelo Grezijono. 1-a grado: Bertrand Gilet, Francio; 2-a grado: Gražina Opulskienė, Litovio; 3-a grado: Aurora Bute, Rumanio. Aktivajoj: teatro, pentrado sur objektoj. ✉ Grezijono (v. 05 jul).

02-10: 16-a MELA (Memzorga Lagumado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbaniĝi. 📞 Laca +36302097864, Andi: +36302752068. 📧 DL8oap@gmx.net; www.krokodilo.de/mela/mela.php.

02-10: 42-a Internacia Esperantista Feriado en Szczawno Zdrój, Pollando. En programo kursoj porkomencantoj kaj progresantoj, kaj abunda turisma programo. 📧 pomer@wp.pl aŭ vrocłavo@poczta.onet.pl.

06-10: 3-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo en Junulara Domo Bongdo, Seulo, Koreio. Meditado-trejnado, Esperanto-kurso, Prelegoj pri la religio. 📧 LEE Jung-kee, esperanto@saluton.net.

09-15: Somera Festivalo – Kunludu kaj kunstudu en Barlastono, Britio. 3-nivela kursaro kun la eblo turismi. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, Britio. ☎ +44(0)1782372141, 📧 eab@esperanto-gb.org.

09-16: Staĝoj en kastelo Grezijono. 1-a grado: Rafael Mateos, Hispanio; 2-a grado: Sorin Porupca, Rumanio; 3-a grado: Christian Rivière, Francio. Aktivajoj: aziaj sanmetodoj, go-Ludo. ✉ Grezijono (v. 05 jul).



09-17: Somera Esperanto-Studado en Modra-Harmónia, Slovakio, kun la unua grandskala renkontiĝo de **lernu!**-uzantoj, helpantoj kaj kreantoj. Komuna somera aranĝo, kiu kombinas studadon de Esperanto kun agrabla feriado kaj amuziĝo en internacia etoso. ✉ Peter Baláz, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. ☎ +421-902.203.369. http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php; petro@ikso.net.

10-15: Nacia Kongreso de Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME) en la marborda urbo Vatomandry. Okazos ankaŭ sesio de Internacia Ekzameno, Baza Nivelo, kun relernado komence de aŭgusto en Antananarivo. ✉ Fidilalao Firaissana Henriel, lot IAH 32 Bis Avaratsena, MG-102 Ambohidrapeto, Madagaskaro. fidilalao@yahoo.fr.

12-16: Kvargrada kurso en Kvinpetalo, Francio. Preparado al la diplomo 'altaj studoj'. Dua-tria grado. 16 aŭg: prelego de J. LePuil, A. LeQuint, kanzonos Ĵak LePuil. ✉ (v. 08 jul).



16-23: Pluezekaj Renkontiĝoj en Plouézec, Francio. Antaŭtagmeze: E-kursoj, ĉiuj niveloj, posttagmeze: turismo en Bretonio, ekskurso, diversaj atelieroj; vespere: distraĵoj, bretonaj dancoj, kantoj, prelegoj ktp. ✉ Plouézec Esperanto, 5 Hent Toul Broc'h, FR-22470 Plouézec, Francio. ☎ +33(0)698495982. pluezek@gmail.com; www.babelo.org.

16-24: Esperanto-Tendaro en Ukrainaj Karpatoj ĉe vilaĝo Dovhe en Zakarpatska oblast, Irŝavskij rajon, Ukrainio. ✉ Nataŝa Pendur, snih@ukr.net.

17: Internacia Esperanta Tablotenis-Konkurso, XX-a IETKO en Hódmezővásárhely, Hungario. ✉ Katarina Faragó, ☎ +36303564202. farago.kata@espmad.hu.

20-24: 100-jara Jubileo de Esperanto-Movado en Lodzo kaj 31-a Tutpollanda Esperanto-

Kongreso en urbo Lodzo, Pollando. Prelegoj, diskutoj, vizitado de urbo, arta vespero, babilado, kafumado ktp. ✉ Lodza Filio de PEA, Robert Kamiński, rk-lodzo@poczta.pl.



22-28: Itala Kongreso de Esperanto kaj Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio prila temo: „Estonto de la Ideo pri Eŭropa Identeco“ en Grosseto, Italio. grosseto2008@esperanto.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>.

22-28: Infana Kongreseto en Grosseto, Italio. ✉ Leonardo Pampaloni, pampal@freemail.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it/grosseto2008@esperanto.it>.



23-30: EKOTUR 08: Ekoturisma renkontiĝo por piedturistoj kaj biciklantoj apud Karlštejn (proksime de Prago). Dumtagaj ekskursoj piede kaj surbicikle tra Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy, vesperaj programoj. ✉ KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420 257712201, chrde@kava-pech.cz; www.esperanto.cz; www.kava-pech.cz; www.kava-pech.cz/trip-ekotur2008-esperanto.html.

23-30: 34-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier, suda Francio. Plurniveloj kursoj, 100m de mediteranea plaĝo, ekskursoj, libroservo ktp. ✉ Esperanto Kulturo kaj Progreso, 10 impasse École J.Ferry, FR-34290 Servian, Francio. ☎/✉ +33(0)4 67391630. jf.passarella@free.fr; <http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>.

30 aŭg-06 sep: 61-a IKUE-Kongreso en Rimini, Italio. ✉ Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ✉ +385 1 37 45 052. marija@catholic.org; www.esperokatolika.org/kongreso2008.



31 aŭg - 06 sep: SUS de AIS San-Marino en Banja Luka, Bosnio-Hercegovino. <http://www.ais-sanmarino.org/>; <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/psusba/>.

septembro

1-15: Aŭtunaj Esperanto-kursoj sur Nigramara

bordo Carevo/Vasiliko, reĝa ripozloko en Bulgario. ✉ Oficejo: Bul. Slivnica 284, Stočna gara - do barza pomošt, BG-1202 Sofia, Bulgario. ☎ +359 2 983 50 84, +359 888 031350, +359 899 882261. lasto@mail.bg.

04 -07: Berlina Arbara Renkontiĝo, Aŭtuna BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. www.krokodilo.de/baro/baro.php; DL8oap@gmx.net.

05-07: 3-a Brazilia Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo. Temo: La transiĝado de la Tero. ✉ waldir.silvestre@globo.com.

14: 7-a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo (SER). ✉ Strato Abilio dos Santos 137, BR-213310-290 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo. contato@lazaroluizzamenhof.com.br.



19-21: XXIV. Artaj Konfrontoj en Esperanto „ARKONES“. Granda manifestacio de Esperanto-kulturo en Poznań, Pollando. Paralele kun ĝi okazos studsesio de lingvistiko en Esperanto ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz. ☎ +48509400317. www.arkones.org/; arkones@esenco.org.

20-21: Solena inaŭguro de daŭra E-ekspozicio ĉe urba muzeo en Svitavy. ✉ Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, CZ-568 02 Svitavy, Ĉeĥio. dvor.libuse@seznam.cz.



21: 11-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga (ERT) en Taguatinga Centro (Braziljo - DF, Brazilo). Temo: Esperanto en Taguatinga. www.taguatek.org.br/; tek.esperanto@ig.com.br.

25-28: 19-a MKR (Mont-Kabana Renkontiĝo) en Dom na Uskovnici, montkabano en la nacia parko Triglav en la nordokcidenta Slovenio. <http://www.keja.hr/mkr-n.html>.

26-29: Internacia Amikeca Renkontiĝo en Aylesford, Kent, Britio. ✉ Anica Page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP, Britio. ☎ +44(0)908564004. terry-page@supanet.com.

oktobro

02-05: 8-a KoKoLoRES - Kafoklaĉo Kaj Ludoj dum Renkontiĝo Semajnfina en Herne, regiono Ruhrgebiet, Germanio.

Samtempe okazos kurso por komencantoj.
✉ kokolores@esperantoland.de.

03-05: 12-a kongreso de Ĉĥa Esperanto-Asocio, kun elekto de novaj komitatanoj de ĈEA en Přerov. ✉ Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, CZ-370 05 České Budějovice, Ĉĥio. ✉ jirka.tomecek@post.cz.



04-11: 16-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Salou, Katalunio (Hispanio). Prelegoj, debatoj, E-kurso, ekskursoj kaj transdonado de la Premio Ada Fighiera. ✉ Luis Serrano Pérez, Apartat 423, ES-08200 Sabadell (Barcelona), Hispanio. ☎ 34 9372750 21. ✉ luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno>.



06-12: InPaSem 2007 (Internacia Paroliga Semajno). Kurso por progresintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Antaŭtagmeze instruhoroj, posttagmeze turisma programo en Prago kaj ĉirkaŭaĵo. ✉ (v. 23 aŭg).

10-12: Jarkunveno de Germana Fervoĵista Asocio GEFA en Bad Tölz, Germanio. En la programo: Trixini. ✉ Siegfried Krüger, SLKrueger@gmx.de.

11-13: 95-a Japana E-Kongreso en Ŭakajama. ✉ jek08@jei.or.jp.

20-24: Bibliaj Tagoj en Kloster Nütschau, Travebrück, Germanio. ✉ Pastro Bernhard Eichkorn. ✉ eichkorn.b@t-online.de.

23-25: 8-a KIES, Komuna Israela Esperanto-Semajnfino, en la Galilea druza vilaĝo Bet Ghan. Ĉeftemo: minoritatoj, religioj kaj folkloro. Eksterlandaj gastoj aparte bonvenaj! ✉ ELI@esperanto.org.il kaj amri@huji.ac.il.

25: Intensa kurso de Kantoo-E-Ligo en la E-Domo en Yatugatake. ✉ Hori Jasuo, ✉ horizon@water.sannet.ne.jp.

26 okt - 02 nov: 3-a Kijiva Esperanto-Semajno. ✉ p/k 35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ☎ +38044-2851701, +3-80974403172. ✉ Volodimir Hordijenko, volodomir@ukr.net; www.kes.h.com.ua/.

26-31: Praktikado de la lingvo en Kvinpetalo, Francio. 2-a grado, praktika pedagogio. ✉ (v. 08 jul).

novembro

01-02: Ĉuugoku-Ŝikoku E-Kongreso en Jamaguĉi, Japanio. ✉ umipa68@violin.ocn.ne.jp.

07-08: Tohoku-E-Kongreso en Oku-Macuŝima, gubernio Mijagi, Japanio. ✉ s-ino Saitoo, saitume@nifty.com.

07-09: KAEST 2008: Konferenco „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ en la pensiono Sokol en Dobřichovice apud Prago, Ĉĥio. Diverstemaj fakaj prelegoj, diskutoj, forumo – kun kvindek da partoprenantoj. ✉ (v. 23 aŭg).

22: Kulturtago, evento de la landaj ligoj de Bremen kaj Malsupra Saksio en Bremen, Germanio. ✉ Thomas Heberlein, ✉ emas@esperanto.de.

28-30: IKF (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem, Ĉĥio. ✉ Miroslav Smyčka, Kojetická 90, CZ-400 03 Ústí nad Labem, Ĉĥio. ✉ m.smycka@seznam.cz.

decembro

06-08: 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto, ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, elstara pedagogo, politika aktivulo kaj esperantisto. Sabadell apud Barcelono, Hispanio. ✉ www.esperanto.cat.

12-14: IX-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, Pollando. ✉ Bjalistoka E-Societo, Piekna 3, p.k. 67, PL-15-282 Białystok, Pollando. ☎ (post la 20-a h.) +48857442213. ✉ esperanto.bialystok@interia.pl.

20-21: 31-a Jara Kongreso de PakEsa en Multan, Pakistano. ✉ Tariq Umar Chauhdry, ✉ pakesa@hotmail.com.

27-29: Komuna Semanario inter ĉina, japana kaj korea junularoj en Ĉiba, Japanio. ✉ S-ino Amano Yayoi, ✉ amanoyayoi@hotmail.com.

27 dec - 03 jan: Jubilea 25-a IF - Internacia Festivalo en Düsseldorf, Germanio. Tradicia aranĝo por familianoj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: „Literaturo“. Tuttaga ekskurso al Aachen-Maastricht-Liège (trilanda angulo DE-NL-BE). Plilongiga eblo ĝis la 4-a de jan. ✉ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +4956248007, ✉ +491714964558. ✉ IF/Platz, HDP@internacia-festivalo.de; www.internacia-festivalo.de/.

30 dec-02 jan: Transjara Kurskunveno de EPA, Japanio. ✉ oficejo@epa.jp.



jano

11-13: Interkultura Seminario en Karnatako, Barato. ✉ ranganayakulu@gmail.com.

11-25: 24-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro okazos en Sidnejo, en „International House“, internacia loĝejo de studentoj de la Universitato de Sidnejo en la urbocentro. ✉ aesk@esperanto.org.au.

majo

01-10: 21-a Esperanto-festivalo „Aroma Jalto“ en Ukrainio. ✉ p/k35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ☎ +380-44-2851701, +380674403172. ✉ volodomir@ukr.net; www.ulej.org.ua/aj.

20-24: Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2009 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✉ DL8oap@gmx.net.

julio

? **65-a Internacia Junulara Kongreso** en Liberec, Ĉĥio.

11: Festivalo pri fiŝista supo en urbo Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso – kun esperantista partopreno! ✉ (v. 02 jul 2008).

25 jul - 01 aŭg: 94-A Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando. ✉ (v. la kolofono).

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:
www.Esperantoland.org.

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj
daŭre konsulteblas ĉe:
www.eventoj.hu/kalendar.



Venu al
16-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo
04-11 okt 2008
en Salou, Hispanio.
✉ luis_serrano@mixmail.com
<http://personales.ya.com/semajno>

La renesanco de Esperanto-bibliotekoj

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis tre interesan periodaĵon *Charta*, kies interesotemoj estas antikvaĵoj, kolektado ktp. Ĝi aspektis serioza, ampleksa, luksa. Scivoleme mi komencis ĝin foliumi por kompreni kial oni sendis ĝin al mi. Kaj mi trovis kvarpaĝan artikolon, kun pluraj fotoj, pri la Esperanta biblioteko de Massa (itala urbo).

La artikolo estas bone verkita, en stilo malpeza sed donanta ĉiujn eblajn informojn pri Zamenhof, la evoluo de la nova lingvo, ĝia gramatiko, la movado, kaj kompreneble la itala biblioteko mem.

En Massa loĝis gefratoj Dazzini, Mario kaj Catina, tre konataj en Esperantujo, kiuj, inter la pluraj iniciatoj, decidis kolekti la kulturon, la historion de la lingvo kaj de la movado en iu biblioteko. Ĝi tutunue lokiĝis en kastelo Malaspina en Massa (inaŭguris ĝin la tiama IEF-prezidanto Nicola Minnaja en aprilo 1992, en ĉeesto de la pola konsulo) kaj jaron post jaro la kolekto pliampleksiĝis per novaj libroj, periodaĵoj kaj diversaj esperantaĵoj.

Post la forpaso de la gefratoj Dazzini, Itala Esperanto-Federacio surprenis la respondecon pri la biblioteko, kaj klopodis solvi la problemon de ĝia prizorgado.

La 24-an de marto 1994 Valerio Dalla, tiama IEF-prezidanto, subskribis kontrakton per kiu IEF donacis la bibliotekon al la itala ŝtato, kaj ĝi estis transportita al la ŝtata arkivo de Massa, kie ĝi nun troviĝas.

Pro la fakto ke ĝian katalogadon devis prizorgi Esperanto-parolantoj, la regiono Toscana financis projekton de la



Esperanto-grupo de Massa por ke la tuta havaĵo estu katalogata. Kaj tio okazis, kaj plu okazas. Sub la energia gvidado de d-ro Alessandro Simonini nun la katalogo haveblas en komputila formo, kaj la biblioteko, entenanta pli ol 5 000 esperantaĵojn, konsulteblas dum la normalaj deĵorhoroj de la ŝtata arkivo.

Plia paŝo estus la establo de kultura centro ĉirkaŭ ĝi, kaj pro tio oni esperas je plia ŝtata aŭ regiona subvencio. Sed ĝi ne estas la ununura Esperanto-biblioteko en Italio. En Milano ĉe la biblioteko de IULM (Libera Universitato pri Lingvoj kaj Komunikoj) ekzistas Esperanto-fako, kiu kreis dank' al donaco de ĉirkaŭ 2 000 libroj kaj gazetoj de la Interlingvistika Itala Centro, kiu aktivis en urbeto apud Milano en la 90-aj jaroj.


Pro interesa koincido (tamen ne hazarda) deĵoranto de tiu biblioteko estas mem esperantisto, Andrea Montagner, kiu kompreneble sin dediĉis entuziasme al la katalogado de la Esperanto-fako.

Antaŭ kelkaj jaroj aperis en itala reta diskutejo la informo ke heredintoj de prof. Stefano La Colla, unu el la plej famaj pioniroj de la Esperanto-movado en Italio kaj en la mondo, deziras ke la Esperanto-valoraj de la onklo ne perdiĝu sed estu aĉetitaj de homoj kiuj komprenas ilian valoron.

Andrea Montagner sukcesis unuflanke konvinki siajn ĉefojn ke nepras akiri tian kolekton, aliflanke konvinki la heredintojn ke la postulata sumo estas tro alta. Fine ili alvenis al interkonsento kaj IULM akiris la bibliotekon. Temas pri gazetoj, bultenoj, libretoj de la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento, pri afiŝoj de la tridekaj jaroj (vidu la bildojn) kaj interesa afero estas ke tiu de La Colla ne estas donaco, sed propraĵo aĉetita de IULM mem kaj konsultebla ĉiutage.

Do, historiistoj venu al Italio kaj trovu interesan materialon! Kontaktoj: Por Massa: d-ro Alessandro Simonini, rete: simonini@bicnet.it. Por IULM: Andrea Montagner, rete: andrea.montagner@iulm.it.

Michela Lipari



Piron rivelas siajn pensojn pri „di“

Dio, psiĉjo kaj mi. Claude Piron. Vieno: IEM, 2007. 173p. 23cm. ISBN 9783010000369.

Prezo: € 15,00

Dio, psiĉjo kaj mi estas, en Esperanto, nova kaj bedaŭrinde la lasta libro de Piron. La verko aperis jam antaŭ kelkaj jaroj en la franca, sed nur ĉi-jare estis eldonita ankaŭ en „la bona lingvo“. La tuta libro estas dialogo inter psikologo kaj viro kiu nokte travivas ion tre eksterordinaran. La viro antaŭe estis paciento de la psikologo pro malagrablaj spertoj kiel kaptito en fremda lando. Tamen nun ne temas pri tio ke „psiĉjo“, kiel la ekspaciento nomas sian psikologon, helpu malbonfartulon, sed pri ia esplorprojekto. Nome la psikologon interesas la bonega resaniĝo de la viro kaj kiel liaj noktaj travivaĵoj povas efiki tiel sanige kaj harmoniige al antaŭe tre vundita animo. Ili regule renkontiĝas kaj diskutas pri tiuj travivaĵoj kiuj preskaŭ ĉiam iel rilatas al „di“. Piron fakte enkondukas novan pronomon, „di“, kiu laŭ li donas pli proksiman kaj intiman rilaton, anstataŭ uzi „Li“ aŭ „Dio“ aŭ simile. (Tio estas por mi plaĉa propono, kiun espereble multaj akceptos.) Ĝenerale la

lingvaĵo, kiel kutime en „pironaĵoj“, estas tre agrabla kaj bela. Kelkaj tajperaroj tamen restas, kaj iom ĝenis min la disskribo de „ekde“. En la libro do plej ofte estas tiel ke la ekskliento parolas pri siaj mirindaj travivaĵoj kaj la psikologo skeptike pridemandas kaj komentas. Oni sentas ke Piron mem laboris kiel psikologo kaj bone scias la ĵargonon. La diskutoj inter la du viroj estas pensigaj kaj donas multe da optimismo. La leganto ricevas vere luman bildon pri di kaj estas agrable vidi kiom intime kaj amikece Piron priskribas „la misteran forton“. Tamen, la diskutoj ne vere donas respondojn al iuj el la tiel nomataj vivdandoj. La libro tuŝas plurajn interesajn demandojn, sed ne multe profundigas en ilin, por tio verŝajne necesus multe pli ampleksa verko. Malgraŭ tio ĝi estas tre interesa, aparte pro tio ke Piron en ĝi supozeble, almenaŭ parte, priskribas siajn proprajn noktajn travivaĵojn kaj sian rilaton al di! Tiun supozon mi bazas je tio ke pluraj aferoj en la libro retroviĝas en la intervjuartikolo *Interesaj respondoj*¹. Do, *Dio, psiĉjo kaj mi* certe estas tre leginda por ĉiuj kiuj volas pli bone kompreni la internajn pensojn de unu el la plej gravaj esperantistoj niampe.

Hokan Lundberg

¹⁾ <http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/respondoj.htm>.



Ritmo, ritmo kaj ritmo

Internacia lingvo. Daniel Haddad. Curitiba: La aŭtoro, 2007. Kun tekstofolio; 42 min. KD. **Prezo: € 10,50**

Antaŭ pli ol monato mi ricevis freŝproduktitan diskon de ridanta junulo Daniel Haddad. Simpatia, sincere ridetanta vizaĝo rigardas min de sur la foto. Mi gratas la nukon, ĉar jam dum kelkaj semajnoj ne regule, sed fojfoje iel pretervole mi revenas al aŭskultado de tiu muziko. Mi serĉas la kaŭzon – kial do fojfoje venas tento reaŭdi tiun aŭ alian kanton? – Ĉu pro tio, ke la disko havas la nomon *Internacia Lingvo*, kaj ĉiuj dek du kantoj iel-

tiel tuŝas Esperanton? – Ne. Estante fidela adepto de nia lingvo preskaŭ dum jarcentduono, mi tamen suspekteme alfrontas trolaŭdadon kaj dolĉvortan adoradon de

Esperanto, supozante (plej ofte prave) ioman malsinceron en ĉiu troigo. Sed mi volas aŭdigi la diskon kaj ekpaŝi enigme, etendante la piedmovojn de kalkanoj al piedpintoj...

– Ĉu min logas la voĉo de l' kantanto?

– Ankaŭ ne. La voĉo ne estas forta, ties tembron mi neniel kapablas memorfiksi, kaj la voĉoskalo, laŭ mi, estas ne tre vasta. Sed mi volas aŭdigi la diskon, inviti mian amikinin,

preni ŝian dekstran manon per mia maldekstra, mian dekstran meti sur ŝian talion dum ŝi metos tenere sian



maldekstran sur mian ŝultron, kaj ekmoviĝi kune – valse aŭ sambe – kio venos...

– Ĉu mi ŝatas la melodiojn de la kantoj?

– Eble jes. Foje ŝajnas al mi ke ne. Mi dubas. Ĉar mankas ia brila intonacio, distinganta unu melodion de alia, do ĉe sinsekva aŭdo la disko sonas iom monotone. Sed mi volas aŭdigi la diskon, invitinte dekon da najbaraj infanoj, fari rondon kun ili kaj eksalteti, ektroti komence laŭhorloĝe, poste – inverse...

– Ĉu al mi plaĉas la kantotekstoj? Certe, iuj plaĉas, sed tute ne ĉiuj. Eĉ ne multaj. Vere, la poemoj estas tre kortuŝaj, abundas neordinaraj komparoj, buntas koloroj, lirlas lingvaĵo – iuloke eĉ la rusa! Tamen mi trovas, ke la pensmaniero de la aŭtoro grave diferencas de la mia; pro tio, aŭdante, ekzemple, la frazon – „Am’ tia linda bele

belegad’ per ekde pac’ sen baroj!“ – mi apenaŭ kapablas kompreni pri kio temas. Sed mi volas aŭdigi la diskon, aŭ mi eĉ preferus inviti la kantiston, ke li sidu ĉe nia somera lignofajro, dum la Esp-a kompanio faru vicon, ĉiu metu la manojn sur la ŝultrojn de antaŭstaranto, kaj la tuta vico gaje ekprancu ĉirkaŭ la fajro, provokante abundajn fajrerojn, kiuj kun ni rododancos en la varma nokto...

Fine. Hodiaŭ mi trovis la klarigon. Estas ritmo, ritmo kaj ritmo! Ritmo optimisma, sen eĉ guto de malgajo. Ritmo paŝa, promena, provoka, rondira, troteta, incita, pranca. Plej ofte nacie kolorigita, sed ie enmeze ankaŭ valsa, rotacia. Ĝuste la ritmoj estas por mi la kerna logaĵo de tiuj kantoj. Kaj mi volas aŭdigi la diskon...

Mikaelo Bronŝtejn

Seslingva resumo de la mondo

A Summary of the World / Un resumen del mundo / Un Résumé du monde / Die Welt in der Zusammenfassung/ Resumo de la mondo. Esther Kokmeijer. Rotterdam: Daarzijn, 2007. 371p. 28cm. Bind. ISBN 9789079344017. Prezo: € 39,00

Esther Kokmeijer, juna nederlanda fotografistino, deziris trakompreni la mondon. Fascinite de la gravita centro, la ekzakta sed nevidebla mezo de ĉiuj kontinentoj, ŝi ekhavis la ideon vojaĝi al ĉiuj tiuj centroj, kiuj kune estas por ŝi la resumo de la mondo. Ĉi tiu libro estas ege resuma raporto de tiu dekkvin-monata vojaĝo. La aŭtorino decidis aperigi la libron ne nur en sia gepatra lingvo, la nederlanda, sed ankaŭ en la angla, la franca, la germana, la hispana kaj en Esperanto. En la ĉefa parto de la libro pluraj el tiuj lingvoj estas uzataj, sed ĉiam apudas referencoj al la paĝoj kie oni povas trovi la tradukojn de la teksto. Ne nur la pli longaj tekstoj, sed ankaŭ la fotoklarigoj estas tradukitaj. Cetere videblas ke la franca bezonis plej multe da spaco, kaj Esperanto plej malmulte. Menciindas ke la teksto en ĉi tiu lingvo ŝuldiĝas al la senlaca Rob Moerbeek.

Jam la kolorplena kovrilo, kun mozaiko de malgrandaj fotetoj, kaj apenaŭ rimarkeblaj longitudoj kaj altitudoj, imponas. Ankaŭ trafolumante la libron, oni ne povas forgesi ke la aŭtorino estas profesia fotografisto. Pluraj tut- kaj eĉ dupaĝaj fotoj, sed ankaŭ dekoj da pli malgrandaj fotoj montras vivan kaj foje tre detalan bildon de la vojaĝo kiun Esther faris. Ekzemple estas fotoj de la enhavo de ŝia dorsosako (kun longa enhavlisto, kiu tamen ne ricevis tradukon), de ĉiuj paĝoj en ŝia pasporto, de la litoj kie ŝi tranoktis, de moneroj ktp.

Post kvar enkondukoj en tri diversaj lingvoj sekvas pluraj indeksoj, inter kiuj la „emocia“ estas la plej originala. Poste ĉiu kontinento ricevas sian ĉapitron. Ĉiuj tiuj ĉapitroj havas la saman strukturon: unue mallongaj geografiaj informoj, sekve listo de ĉiuj lokoj vizititaj, kun apude simboloj kiuj montras kiamaniere ŝi kaj la kunvojaĝanto Gijs atingis la diversajn lokojn: ĉu piede, bicikle, ŝipe, aviadile, ĉevale ktp. La fotoj, kiuj konsistigas la plej grandan parton de ĉiu ĉapitro, montras pejzaĝojn, homojn aŭ situaciojn en ne ĉiam kutima maniero. Aldone estas grandaj mapo kaj

satelita foto de la loko kie situas la gravita centro. La teksto de ĉiu ĉapitro limiĝas al dupaĝa raporto de la lastaj, ofte malfacilaj kilometroj al tiu nevidebla mezo, kie Esther ĉiam lasas iun efemeran signon. Tiun signon ŝi faras per materialo kiun ŝi trovas surloke, kaj tiel ke ĝi ne ĝenas la ĉirkaŭaĵon.

Kio ja povus ĝeni la leganton estas la kombino de koloroj por la papero kaj por la teksto de la tradukoj kaj de la indeksoj, kiu malfaciligas la legadon. Bedaŭrindaj estas ankaŭ kelkaj (tajp)eraroj, kaj ne nur en la tradukitaj partoj.

Resume oni povas diri ke la libro impresas, kaj pro la originala vojaĝocelo, kaj pro la originala kaj plejparte profesia maniero prezenti la vojaĝon per vortoj kaj bildoj. Kaj Esther Kokmeijer promesas

daŭrigon: ankoraŭ ne eblis iri al la gravita centro de Antarktiko, sed iam ŝi iros ankaŭ tien....

Heidi Goes



Aldono de la Libroservo: parto el la profito rezultanta el la vendo de la libro donaciĝos al la projekto SOS-infanvilaĝoj (www.soskinderdorp.nl).

La gezelig-a (Neder)lando

Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj.

Rodney Bolt. Trad. Simon Davies. Rotterdam:

Eldonejo Bero, 2008. 63p. 18cm. Prezo € 6,00

Post la brila *Ksenofobia gvidlibro al la italoj* (Milano: IEF, 2006) Eldonejo Bero jen donacas al ni plian amuzan manlibron pri transkulturismo. Postlege de tiaj libretoj oni vidas ke eble ne tiel forte staras „muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj“. Jen tia literaturo por la kongresanoj kiuj spertos nederlandajn kulturon kaj morojn dum almenaŭ unu semajno.

La popoloj kaj iliaj moroj ja diversas kaj malsamas, sed tio ne devas esti kialo por malŝati sed prefere motivo por ridi. Temas pri aparta speco de humuro, kiu tamen kreskas sur delikata grundo. Temas ĉiam pri la ĝusta mezuro kaj bona gusto: kiel komenti la kulturajn diferencojn por ne ofendi? Kio spritas al unu flanko, foje malbone efikas ĉe l' alia. Alia danĝero estas la stereotipoj. Ili ja ĉiam ekzistas sed ne ĉiam veras. La kongresanoj renkontos malmultajn nederlandanojn promenantajn en lignaj ŝuoj, pluraj tute

ne frenezas pri futbalo, kaj mi konas multajn kiuj ne ŝatas fromaĝon. Sed vi ja trovos multajn „kafejojn“ (coffee shops) kie oni konsumas leĝerajn drogojn, kaj en pluraj urboj vi vidos publikulinon en montrofenestroj. Sed ne kredu ke la nederlandanoj kiel tuto pravigas la praktikon. La diskutoj, foje ardaĵ, pri tiu temo neniam ĉesas. Tipe nederlanda eco estas ke nederlandanoj neniam konsentas plene kun si mem... ĉiam restu spaco por nuancoj.

Libretoj kiel tiu ĉi tamen ne povas eviti ekspluatadon de stereotipoj. Vi trovos ilin do, sed ne kredu ke la aferoj tiel simplas. La nederlandaj socio kaj kulturo tro kompleksas por pravigi ilin. Ekzemple pri la rilato al germanoj. Sincere dirite, mi ne ŝatas ekspluatadon de tiu ĉi esence ŝovinisma kaj stulta stereotipo, kiun jen ankaŭ tiu ĉi libro ripetas. Tamen la stereotipo pri malamo al germanoj estas troigita kaj esence malvera. Alia suspektinda karakterizo de la nederlanda socio estas la fama toleremo. Lastatempe grandan sukceson havas kelkaj politikaj partioj kiuj predikas ĝuste la malon, ĉefe rilate la islamajn kuncivitanojn. Sed ja ankoraŭ estas plimulto de nederlandanoj kiuj ĝuste oponas tiun tendencon. Kiel tiam paroli pri stereotipoj?

Koncize dirite, pri ĉiu stereotipo mi povus konsenti ke estas grajno da vero en ĝi, sed ĉiun el ili mi komentus per „jes, ja... sed...“ Nu, ankaŭ tio estas tipe nederlanda! Aliaj stereotipoj estas tiuj de komercemo kaj kalvinismo. La nederlanda ekonomio lastatempe spertis kelkajn gravajn batojn, ekz. perdon de la banko ABN AMRO al la belgaj najbaroj.

Oni povus doni plurajn indikojn ke belgoj eble pli lerte komercas ol nederlandanoj mem, kaj pri kalvinsimo... la plimulto de iamaj kalvinistoj estas nun ateistoj, dum la vera plimulto de religiaj nederlandanoj estas fakte katolikoj (foje tre dogmaj), kaj nuntempe certe islamanoj. Stereotipoj havas historian valoron sed ankaŭ sian uzdaŭron. Tipaj nederlandanoj hodiaŭ estas ankaŭ surinamano, marokano, ĉino kaj polo... Formiĝas nova bildo de la nederlanda nacio, kaj ĝi bezonas novajn stereotipojn.

Sed tamen: ni ne forgesu la „verajn“ *nederlojn*! Ili ja donas la tonon al la tuto! Pri ili temas tiu ĉi libreto kaj ofte ĝi trafe kaptas la amuzajn detalojn. Vi ridos, sed ne forgesu ke iuj detaloj estas pli ol veraj! En tiu senco temas pri serioza libro. El ĝi vi povos lerni pri Nederlando eĉ se vi ridos. Sed kiel scii, kio estas nur amuzaĵo kaj kio la vero? Nu, por malkovri tion estas nur unu maniero: kunvivu kaj spertu mem... Eble vi verkos poste libreton pli trafan kaj amuzan! Sed antaŭ tio vi nepre bezonas tiun ĉi gvidlibron. Estas brile ke vi povas legi ĝin en Esperanto.

Nikola Rašić



Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj

**Esperanto-bibliotekoj havas denove
ŝancon pligrandigi siajn kolektojn, ĉar
ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn
de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul
Thorsen.**

Raĵtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis subvenciojn je la valoro de 75 ĝis 250 eŭroj.

La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2008. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bonharon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi per la retejo www.poulthorsen.dk.

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Bibliografio de litoviaj

Esperanto-eldonaĵoj (1890-2006). Kompilis Petras Čeliasuskas. Litova E-Asocio, 2008. 31p. 21cm. ISBN 9789955034629. € 6,00

Bonfara fonduso nome de Vasil Eroŝenko „Espero“ (Kijivo, Ukrainio). Luc'k: Nadstir'ja, 2008. 56p. 21cm. ISBN 9789665176169. Du-lingva (E, ukraina). Prezentado de organizaĵo kaj kelkaj materialoj pri Vasil Eroŝenko. € 4,50

Dai 92kai sekai esperanto taikai houkokusyo (92 kyuzyu ni). LKK de la 92a UK. Tōkyō-to: JEI, 2008. 146p. 26cm. Ilus. Japanlingva raporto pri la 92-a Universala Kongreso de Esperanto. € 6,90

Duakanonaj libroj, La. Volumo 3: Libro de la Ortodoksiaj Eklezioj. El la helena kaj latina trad. G. Berveling. Zwolle: Voĉoj Kristanaj, 2008. 233p. 21cm. € 19,50

Eseoj. Johano Besada. Edegem: MAS, 2007. 91p. 21cm. ISBN 9782952953733. Deko da eseoj diverstemaj. € 10,20

Esperanto at Ease. Syam Sundar Pal. Kalkato: FEB, 2008. 131p. 25cm. Baza lernolibro por parolantoj de la Barata varianto de la angla. € 2,70

Esperanto direkta metoda. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la serban trad. T. Kapista. Martin: La aŭtoro, 2008. 114p. 25cm. ISBN 9788089312078. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por serblingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto, L': Franca-esperanta konversacio. Zohra Mraihi, Thierry Saladin. Ilustris Jala. Vichy: Aedis, 2006. 8p. 22cm. ISBN 2842592646. Bele ilustrita esprimaro por franclingvanoj. € 2,70


Esperanto – la plej bona propedeŭtiko. Esperanto – nailuĉŝaja propedeŭtika. Div. Moskvo: Eŭropa Universitato „Justo“, 2007. 149p. 30cm. ISBN 9785716101791. Ilus. Du-lingva (rusa, E). Dokumentoj kaj materialoj lige kun la Internacia Konferenco en Moskvo la 13-an de aprilo 2007. € 15,00

Esperanto tiesioginiu metodu. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la litovan trad. I. Pileckytė. Martin: La aŭtoro, 2008. 114p. 25cm. ISBN 9788089312085. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por litovlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperantujismo. Gbeglo Koffi. Edegem: MAS, 2008. 71p. 21cm. ISBN 9782952953757. Tre personaj vidpunktoj de togolanda esperantisto pri diversaj aferoj, ne nepre rilataj al Esperanto. € 6,00

Glottofagia ed etnolisi. Per la salvaguardia dell' „identità“ linguistica e culturale dell'Europa. Andrea Chiti-Batelli. Enkonduko de Pierre Janton. CEDAM, 2008. 130p. 24cm. ISBN 9788813280932. Ilus. Itallingva. Pledo por pli aktiva politika agado por savi la kulturan kaj lingvan identecon de Eŭropo. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.




Imagier français-espéranto, L'. Henri Medori. Ilustris Jala. En Esperanton trad. T. Saladin. Vichy: Aedis, 2006. 8p. 22cm. ISBN 284259326X. 225




vortoj franclingvaj kun iliaj Esperantaj ekvivalentoj. Plene kolorilustrita. € 3,00

Infanoj en la arboj, La. Gudrun Pausewang. El la germana trad. N. Caragea. Frankfurt am Main: La tradukinto, 2008 (2a eld.). 61p. 20cm. Ilus. Infanoj malhelpas la planon forbruligi arbaron. € 9,30

Istorija Sojuza Esperantistov Sovetskikh Respublik / Istorija raboĉego esperanto-dvijenija. Oleg Krasnikov / Detlev Blanke. Moskva: Impeto, 2008. 215p. 22cm. ISBN 9785716101784. Ruslingva. Ilustritaj historioj de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj de la Laborista Esperanto-Movado (IPE, EKRELO, Esperanto kaj socialismo). € 14,10





Ivan Franko. El la ukraina trad. div. Lucjko: Nadstir'ja, 2008. 80p. 21cm. ISBN 9789665176138. Poemoj kaj prozaĵoj de ĉefa figuro de la ukraina literaturo. € 3,90

Kelt-semidaj lingvoj, La. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2008. 143p. 21cm. ISBN 2906134791. Provo de komparo de la keltaj lingvoj kun la semidaj lingvoj. € 12,00

Koteado en konstru-desegnoj. Jan Werner. Brno: La aŭtoro, 2008. 39p. 21cm. Dokumento favore al nova termino por la notacio de dimensioj. € 3,90

Lingvaj oreroj. Proverbaro ukraina-esperanta. Kompilis Ihor Drul. Luč'k, 2008. 24p. 21cm. 737 proverboj ordigitaj alfabeto laŭ la ukraina versio. € 3,00

Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro). Nicolino Rossi. Napoli: Napola E-Asocio. 191p. 21cm. Kolorilustrita, profesie farita gvidlibro de la ĉefurbo de la itala provinco Kampanio. € 12,00

Nia M/S „Zamenhof“. Erasm Nawrowski. Toruń: Flamo, 2007. 45p. 21cm. ISBN 9788392419792. Ilus. Historio de kaj informoj pri la pola ŝipo „Zamenhof“. € 5,10

Polnyj slovar' esperantskago (mejdunarodnago) jazyka. Plena vortaro rusa-internacia. Dr. Esperanto. Antaŭparolo: Elena Ševčenko.

Moskva: Impeto, 2007. 232p. 15cm. ISBN 9785716101814. Faksimila represo de la eldono 1889. € 9,90

Pordo de inicado, La. Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2008. 125p. 21cm. „Rozkrucana mistero“ en 11 bildoj. € 9,00

Prälat-Schleyer-Jahrbuch. Div. Red. Irmi & Reinhard Hauptenthal. Saarbrücken: Iltis, 2008. 237p. 21cm. ISBN 9783932807695. Ilus. Germanlingvaj eseoj pri la vivo, agado kaj verkaro de la kreinto de Volapük. € 39,60

Provo de la animo, La. Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2008. 106p. 21cm. Scena vivobildo kiel postludo al *La pordo de inicado*. € 9,00

Sub fremdaj ĉielo. Edwin de Kock. Antverpeno: FEL, 2007. 286p. 21cm. ISBN 9789077066331. Poemoj kaj eseoj. € 21,30

Verbes transitifs, verbes intransitifs démistifiés en dix leçons et sans effort. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2008. 28p. 21cm. ISBN 2906134805. Franglingva. Komparo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj en la franca kaj Esperanto, kun abundo da ekzemploj. € 3,60

Vespere. Mikaelo Gišpling. Enkonduko de Vladimir Samodaj. Moskvo: Impeto / Eŭropa Universitato „Justo“, 2008. 126p. 17cm. ISBN 9785716101838. Kun ilustraĵoj de Isaak Levitan. La plej freŝa poemaro de ekssovetia, eksrusia, nun israela poeto aparte talenta; originalaj kaj tradukitaj poemoj. € 6,00

Vojaĝimpresoj tra Siberio kaj Japanio. Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto, 2008. 143p. 21cm. Impresoj el vojaĝo per la Transsiberia Trajno kaj el la lando de la 92-a UK. € 12,00

Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto. Lingvaj premisoj, tipoj, specifeco kaj antologieto. Aleksandro S. Melnikov. San-Marino / Moskvo / Rostov-na-Donu: AIS, 2008. 224p. 21cm. ISBN 9785903687015. „La libro povas esti interesa kaj por sciencistoj kaj por laikaĵ“. € 15,00

Nelibroj

Bildkarto „D-ro Esperanto“. Jomo Ipfelkofer. Augsburg: La aŭtoro, 2008. 14cm. Pentraĵo surhavanta portreton de L.L. Zamenhof. € 3,00 (10 ekz.)

Esperanto per 501 vortoj. Kun iom da voĉ-legado. A. Kerbel. Hajfo: La aŭtoro, 2008. La tri volumoj de Esperanto per iom... sur unu komputila kompaktdisko en formato PDF por PC kaj Mac. KD. € 3,00

Fabeloj de Andersen 5. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2008. 57min. Enhavas *Lekanto*, *Persista stana soldato*, *Ligo de amikeco*. KD. € 12,00

Fabeloj de Andersen 6. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2008. 53min. Enhavas *Sovaĝaj cignoj*. KD. € 12,00

Fabeloj de Andersen 7. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2008. 46min. Enhavas *Ĝardeno de la paradizo*. KD. € 12,00



Fabeloj de Andersen 8. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2008. 68min. Enhavas *Fluganta kofro*, *Cikonioj*, *Kupra porko*. KD. € 12,00

Fabeloj de la fratoj Grimm 5. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. Kabe. Martin: Stano Marček, 2008. 39min. Enhavas *La kuraĝa tajloreto*, *La maljunulino Holle*, *La bremenaj muzikistoj*. KD. € 12,00

Fabeloj de la fratoj Grimm 6. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. Kabe. Martin: Stano Marček, 2008. 46min. Enhavas *Tri oraj haroj de la diablo*, *Fingreto*, *Sesope oni trairas la tutan mondon*. KD. € 12,00

Fabeloj de la fratoj Grimm 7. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. Kabe. Martin: Stano Marček, 2008. 52min. Enhavas *Maljuna avo kaj nepo*, *Kamarado Gaja*, *Doktoro Ĉioscia*, *Ursa felo*, *Tri fratoj*. KD. € 12,00

Fabeloj de la fratoj Grimm 8. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. Kabe. Martin: Stano Marček, 2008. 57min. Enhavas *Steloj talaroj*, *Neĝulino kaj Rozulino*, *La vivolongo*, *La senditoj al la morto*, *Paŝtistino de anseroj apud puto*. KD. € 12,00

Kanaria karnavalo. 2007. Ĉ. 1h. Televida raporto en la hispana, dublita en Esperanto. DVD. € 10,50

DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: L.F.C. Vencio. Italio: M. Menichetti. Japanio: T. Sasaki. Litovio: A. Kaspiravičius. Pollando: T. Nemere. Svislando: W. Nüesch.

PATRONOJ DE TEJO

Aŭstralio: J. Bishop; H. Green. Finnlando: S. Mynttinen; R. Pyhälä. Francio: F. Dhersignerie. Germanio: J. Zimmermann. Usono: S. Cobb.

SOCIETO ZAMENHOF

Aŭstralio: J. Bishop; K. Enderby. Brazilo: A. Rabêlo; M.B. dos Santos; V.M. da Silva. Britio: G. Sutton; E.R. Waterworth. Finnlando: S. Mynttinen; R. Pyhälä. Germanio: A. Kronenberger; I. Taurat. Hispanio: L. Parada. Italio: S. Stoppoloni. Japanio: K. Deguti; Y. Itou; A. Morita. Kanado: S. T. Norvell. Korea Respubliko: C.-Y. Lee. Kroatio: K. & I. Osibov. Litovio: A. Kaspiravičius. Nederlando: W. Akkerman; A. & H. Bakker; R. Bossong; L. Demmendaal; M. v/d Horst-Kolińska. Svislando: B. Graf. Tajlando: D. Cohen. Usono: D. Wolff.

DONACOJ (en eŭroj) Ĝis la 1-a de junio 2008

Ĝenerala kapitalo: Belgio: E. Ernst (heredaĵo) 127 534,13. *Sumo ĉi-jara:* 127 534,13.

Konto Afriko: Brazilo: R. Conde 98,01. Germanio: K. Blankenburg 10,00; J. Hamann 20,00; R. Meisel 10,00; M. Wolters 10,00. Hispanio: M. Parra 48,17. Nederlando: C. & R. Bossong 50,00. Nov-Zelando: A. Jansen 50,04. Svedio: J. Hammarberg 21,43. *Sumo ĉi-jara:* 1 099,68.

Fondaĵo Ameriko: Aŭstralio: J. Bishop 100,00. Finnlando: A. Karkiainen 50,00. Francio: B. Schumann 25,00. Germanio: V. & D. Blanke 200,00; M.F. Reisel 200,00. Italio: O. Carotta 100,00; R. Corsetti 25,00; E. Doerfler 50,00; M. Lipari 100,00. Nederlando: W. van Ganswijk 25,00; J. Venema 25,00. Svedio: J. Hammarberg 64,29. *Sumo ĉi-jara:* 1 535,96.

Fondaĵo Azio: Japanio: T. Konisi, Y. Mizuno – po 24,54; Y. Hotta, M. Isino, M. Iwai, T. Saito – po 12,27; H. Gotoo, M. Isaki – po 36,81; H. Fukumoto 61,35; Y. Itou, K. Kobayashi – po 30,67; F. Inumaru 18,40; J. Akada 122,70; K. Gotoo, Y. Gotoo, Y. Izumi, T. Kaba, S. Oonisi, Y. Oozato, Z. Sibayama, E-Densyusyo Sue, E-Ligo de Sikoku, Miyazaki E-Soc. – po 12,18; K. Kai 24,37. *Sumo ĉi-jara:* 1019,57.

Fondaĵo Canuto: Francio: M. Amadieu 10,00; F. Dhersignerie 60,00. Nederlando:

A. Bakker 1 885,00; R. Moerbeek 50,00.

Svedio: C. Lörnemark 80,00. Usono: J. Amis 150,00. *Sumo ĉi-jara:* 3 410,46.

Fondaĵo Espero: Finnlando: A.-L. Heikkinen 100,00. Kroatio: A. Kocijan 5,00. Norvegio: D. Draper 30,00. Usono: M. Kennedy 71,43. *Sumo ĉi-jara:* 506,43.

Fondaĵo Junularo: Usono: D. Gaines 12,70. *Sumo ĉi-jara:* 75,94.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: J. Bishop 100,00. Finnlando: R. Pyhälä 31,00. Francio: M.A.J. Pacico 22,00. Germanio: E-Klub München 511,00. Nederlando: A. Nonima 47,00; S.P. Smits 100,00; A. & H. Bakker 1 000,00. *Sumo ĉi-jara:* 4 797,09.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger 50,00. *Sumo ĉi-jara:* 50,00.

Domrenovigo: Italio: K. Fantin 20,00. *Sumo ĉi-jara:* 20,00.

Ĝenerala kaso: Francio: R. Triolle 125,10. Nederlando: A. Bakker 1 000,00. *Sumo ĉi-jara:* 1 324,18.

Al ĉiuj koran dankon! UEA



Kantanta kantareto.

A. Kerbel. Hajfa: La aŭtoro, 2008. Tekstoj por 16 kantoj originalaj aŭ tradukitaj, en formato PDF. Aldone, la samaj kantoj interpretitaj de la aŭtoro. Porkomputila KD. € 9,90

Koverta „100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio”. Ukrainio, 2007. La verdaj flago kaj jubilea simbolo apud skizo de la CO de UEA. € 0,30

Koverta „120-jariĝo de Esperanto”. Ukrainio, 2007. La Babelturo + Esperantaj simboloj. € 0,30

Revizoro, La. Nikolai Gogol. Esperanto-videoservo, 2007. 124min. Rusia filmo (1952) de Vladimir Petrov; subtitolita per la traduko de L.L. Zamenhof. DVD. € 10,50

Ridu kun ni. La Verda Pajaco. Kanariaj Insuloj: Tony Sar, 2007. Ĉirkaŭ unu horo da popularaj

humuraĵoj, registritaj dum Esperanto-kunveno. KD. € 6,60

Stranga butikoj, La. Raymond Schwartz. Voĉlegas Stano Marček. Martin: Stano Marček, 2008. Du diskoj; suma daŭro 117min. Voĉlegita versio de la tuta libro. KD. € 24,00

Ukrainio: koverta „Bonfara fonduso nome de Vasil Eroŝenko ‘Espero’”. 2007. Portreto de Eroŝenko sur verda fono. € 0,30

Ukrainio: poŝtmarko „100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio”. 2007. € 1,50

Ukrainio: poŝtmarko „120-jariĝo de Esperanto”. 2007. € 1,50

Ukrainio: poŝtmarko „Bonfara fonduso nome de Vasil Eroŝenko ‘Espero’”. 2007. € 1,50

Ukrainio: poŝtmarko Vasil Eroŝenko. 2007. € 1,50

Veturi per la trajno Zamenhof

En Pollando ekzistas kutimo nomumi la plej gravajn trajnojn per originalaj nomoj aŭ tipaj al la regiono, aŭ de konataj homoj. Unu el ili estis la trajno „Narew“ (nomo de Pollanda rivero), iranta de Bjalistoko tra la tuta lando ĝis la suda, ĉemontara Bielsko-Biała.

Komence de junio, por omaĝi la kreinton de Esperanto, la trajno ricevis la nomon **Zamenhof**. Estis frua mateno, la 1-a de junio, kiam al la bjalistoka stacidomo alvenis eksterordinaraj gastoj. Ludoviko Zamenhof kun sia edzino Klara (sur la dekstra foto) decidis traveturi per trajno la tutan Pollandon. En la realo la personoj estis bjalistoka esperantistino Nina kaj urbodoma oficisto Andrzej, vestitaj per taŭgaj kostumoj de la koncerna epoko. Krome ĉeestis pluraj esperantistoj, venintaj malgraŭ tre frua horo, por adiaŭi la paron.

*Ni estas fieraj, ke la trajno **Zamenhof** rememorigos al vojaĝantoj pri Bjalistoko kaj ĝia digna loĝanto, Ludoviko Zamenhof – diris Elżbieta Załuska, la direktoro de la*



regiona fervoja oficejo. Venis ankaŭ Tadeusz Truskolaski, la urbestro de Bjalistoko (la suba foto, maldekstre), kiu salutinte ĉiujn alvenintajn gastojn solene ŝanĝis la trajnan ŝildon. Je kvarono antaŭ la sesa la urbestro blovis fervojistan fajfilon kaj la trajno foriris.

Dumvoje gesinjoroj Zamenhof estis elkore akceptataj de Esperantaj grupoj. Je la oka tridek oni kantis kaj deklamis al la trajno en Varsovio, du horojn poste ĝi estis salutita de infanoj en Piotrków Trybunalski, antaŭ la 13-a horo ĝi ricevis donacojn en Sosnowiec kaj je la 14-a 40 la trajno fine alvenis al Bielsko-Biała; oni transmetis ĝin al la trako pli proksima de la stacidomo, por povi solene akcepti la gastojn kun loka montarana muziko.

En la urbo oni diskutis pri la trajno, Esperanto kaj la venonta kongreso, kaj okazis vizito al bazlernejo, kie oni planas instrui Esperanton. Post dutaga restado la aktoroj revenis al la naskiĝurbo de Ludoviko.

En la trajno estis disdonataj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko, por sciigi pri la 94-a Universala Kongreso, kiu venontjare okazos en nia urbo.

Przemysław Wierzbowski



Rezolucio de pola Sejmo pri UEA

La pola sejmo (parlamento) omaĝis la 100-an datrevenon de la kreiĝo de UEA.

Esperanto ligas homojn en riĉa kaj valora kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco – substrekiis deputitoj en la unuanime proklamita rezolucio.

En la datreveno de la kreiĝo de UEA la Sejmo emfazis la rekonvortojn al la daŭrigantoj de la verko de d-ro

Ludoviko Zamenhof, kiu kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝo sendepende de nacieco, raso, religio kaj propraj mondkonceptoj.

„La sejmo, dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo, subtenas la klopodojn de internaciaj medioj, ke UEA estu honorita per la paca Nobel-premio”. (El rezolucio de la pola Sejmo de la 12-a de junio 2008)



Esploroj pri UK en Moskvo

Laŭ invito de Rusia Esperantista Unio la ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller vizitis Moskvon de la 17-a ĝis la 21-a de majo por esplori la fizikajn kaj organizajn kondiĉojn por eventuala okazigo de Universala Kongreso de Esperanto tie en la jaro 2010. En februaro Buller vizitis samcele Havanon.



Buller konatiĝis kun eblaj ejoj de UK kaj renkontiĝis kun oficialuloj de la urbo Moskvo. Flanke de la urbaj instancoj akceptis lin vicurbestro A.V. Petrov, kiun akompanis reprezentanto de la internacia fako de la urbestrejo kaj vicedro de la kleriga fako. S-ro Petrov ripetis la inviton de la Moskva urbestro Luĵkov okazigi UK en lia urbo en 2010. En la kunsido partoprenis ankaŭ i.a. Andrej Grigorjevskij (prezidanto de REU), prof. Gennadij Ŝilo (rektoro de la Eŭropa Jurscienca Universitato „Justo“) kaj Svetlana Smetanina el la Moskva E-Klubo „Leo Tolstoj“. La urbestro invitis Buller ankaŭ al vespermanĝo, kie la urbon reprezentis vicprefekto de la Centra Arondismento

G. Borjatskaja kaj respondeca oficisto de la internacia fako K. Petrov.

Ne mankis tempo por konatiĝi kun vidindaĵoj de Moskvo. Al ili apartenis surpriza „pintrenkontiĝo“ de Buller kaj Grigorjevskij kun V.I. Lenin kaj la lasta caro sur la Ruĝa Placo. Kun Lenin eblis rekta interparolo, ĉar en lia rolo deĵoris tiutage esperantisto Anatolij Koklenkov, kiu rakontis pri sia laboro kaj eĉ kantis Internacion en Esperanto. UEA evidente ne bezonus havi zorgojn pri politika neŭtraleco, ĉar la invito de UK al Moskvo ricevis komunan subtenon de Lenin kaj la caro.

Osmo Buller

Francaj esperantistoj en Martigues

Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE/Espéranto-France) kongresis en Martigues (Provenco) de la 8-a ĝis la 12-a de majo 2008 kun siaj membraj asocioj.

Partoprenis 134 homoj el ses landoj, precipe el Francio, sed ankaŭ el Germanio, Hispanio, Luksemburgio, Pollando kaj Rumanio. Bone kaj sune disvolviĝis la tuta kongreso.

La landa kongreso estis inaŭgurita en la ĉeesto de la urbestro kaj de Seán O'Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu prelegis franclingve pri lingva kaj kultura diverseco en Eŭropa Unio. La komitato de UFE estis parte renovigita

kaj elektis novan estraron (vidu la foton, sinsekve): François Bartsch, Aleks Kadar, Armelle Piolat, Xavier Dewidehem (prezidanto), Claude Nourmont kaj Cyrille Hurstel.

Laborkunsidoj temis pri interasocia kunlaboro, regionaj federacioj, komuna franca Esperanto-revuo k.a. Krom UFE jarkunvenis la Provenca Federacio, la Grupo de la Esperantistaj Edukistoj (GEE), Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA) kaj Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE). Okazis prelegoj, ekskursoj, ekspozicio pri Provenco kaj paco, globluda konkurso kaj aŭkcio. La kongresanojn

regalis la muzikparo „Duoble Unu“ per varia koncerto. La altkvalitan teatraĵon de Lee Blessing *Sendependeco* (drameca komedio) ludis kun granda talento la trupo „La Cikadoj“.

(Laŭ Komunikajo de UFE)



Meri Abolskaja (1929-2008) mortis la 19-an de marto en Sankt-Peterburgo, kie ŝi preskaŭ duonjarcenton instruis Esperanton. Ŝi verkis la lernolibron *Metodiĉeskie razrabotki po jazyku Esperanto* (1990) kaj la memorlibron pri Nikolaj Rytjkov, *Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo* (1999).

Frederic Alberich Jofré (1908-2008) forpasis la 3-an de marto en Barcelono, ses monatojn antaŭ sia 100-jariĝo. Li estis la lasta el kvar fratoj, kiuj aktive rolis en la kataluna Esperanto-movado.

Ilija Jordanov Andreev (1929-2008), iama fakdelegito pri tornado de metaloj kaj SOS-aŭtoservo, mortis en Ŝumen (Bulgario).

Lucien Bourgois (1923-2008) mortis la 19-an de aprilo en Noyelles-Godault (Francio). Li estis prezidanto de la Nordfrancia E-Federacio 1976-1999 kaj ĉefredaktoro de ĝia bulteno *Norda Gazeto* ekde 1960 ĝis sia forpaso. Li aŭtoris *Laŭ la fluo de l'interparolo* (1985, 2-a eld. 2005), *Proverbaro Franca-Esperanta* (kun G. Lagrange; 1991), *Esprimaro franca-Esperanta*

(1997) kaj *Kvarlingva proverbaro* (2000).


Mordeĥaj Braĥa (1925-2008), fidela kluba aktivulo kaj regula partoprenanto de UK-oj, mortis la 16-an de februaro en Tel-Avivo.

Margot Gerson (1919-2008), dumviva membro de UEA, forpasis la 13-an de marto en Novjorko. Ŝi havis grandan rolon en la starigo kaj funkciigo de la Novjorka Oficejo de UEA, kies financa subtenanto ŝi estis dum multaj jaroj. Ŝi estis aktiva ankaŭ en la iama Esperanto Information Center en Novjorko kiel kunlaboranto de Mark Starr.

Kraŝtju Karucin (1915-2008), iam aktiva ano de la bulgara sekcio de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, movada historiisto kaj arkivisto, forpasis la 10-an de junio en Sofio.

Liam Kirk / Ó Cuirc (1922-2008), kolono de Esperanto-Asocio de Irlando kaj delegito pri la irlandaj lingvo kaj kulturo, mortis la 28-an de majo en Dublino. Li kolektis kaj mem verkis grandan aron da

artikoloj pri EAI kaj aŭtoris *Mallonga Historio de la Esperanto-Movado en Irlando* (1996). Li plenumis plurajn funkciojn en EAI kaj fariĝis ĝia honora prezidanto.



Le Nhiem (1930-2008) forpasis la 18-an de majo en Ho-Chi-Minh-Urbo. Li lernis Esperanton, dum li studis la inĝenieran scienccon en Gdańsk, Pollando. Li estis direktoro de la Sajgona haveno. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la Esperanto-Asocio de sia urbo kaj membro de la Centra Komitato de Vjetnama Esperanto-Asocio. Malgraŭ serioza malsano li ankoraŭ grave kontribuis al la aperonta Esperanta-vjetnama vortaro.

IKU-resumoj en la reto

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) en Roterdamo havos nekutime riĉan oferton. La resumoj estas jam legeblaj en la IKU-retejo <http://uea.org/dokumentoj/IKU> en la paĝaro de UEA.

Okazos dek altkvalitaj, varitemaj prelegoj (la deknua preleganto, Orlando Raola, devis nuligi sian partoprenon pro profesiaj kialoj). Kvin el ili estas pri la kongresa temo: *Lingvoj: trezoro de la homaro*.

Prijuĝis la novelektita IKU-komisiono (d-ro Sabine Fiedler, prof. Michael Maizen, prof. Humphrey Tonkin, Wen Jingen kaj prof. Amri Wandel), aplikante novan, science kunmetitan voĉdonan metodon. La kandidatoj estis prijuĝitaj laŭ tri kriterioj (faka nivelo, tema intereso, lingva nivelo). Partoprenantoj de la AIS-kursoj kiuj tion deziris povos ekzameniĝi kaj ricevi AIS-atestojn.

Amri Wandel

93-a UK: Francio la plej amasa

Ĝis la 15-a de junio, 1709 esperantistoj el 72 landoj aliĝis al la 93-a Universala Kongreso en Roterdamo (19-26 julio).



Francio, kiu staras ĉepinte de la statistiko ekde la komenco de la aliĝado, ne plu bezonas timi, ke la surlokaj aliĝoj povus minaci ĝian unuan lokon. Unu monaton antaŭ la UK ĝi estis la sola lando kun pli ol 200 aliĝintoj, nome 213. Je granda distanco sekvis Germanio (160) kaj la gastiganta lando Nederlando (149). Pli ol 100 aliĝintojn liveris ankaŭ Japanio (122). Aliaj landoj kun pli ol 30 aliĝintoj estas Rusio (90), Belgio (74), Italio (71), Litovio (66), Pollando (54), Britio (52), Hungario (46), Brazilo (42), Irano (41), Danio (39), Hispanio (36), Finnlando (35), Svedio (33) kaj Svislando (32).

Osmo Buller

KLASIKAĴOJ

je bagatela prezo!



VIKTIMOJ
Julio Baghy
€ 6,00

La Libroservo de UEA transprenis la tutan stokon de la eldonaĵoj de Fenikso kaj draste malaltigis iliajn prezojn:



PILGRIMO
Julio Baghy
€ 4,80



SUR SANGA TERO
Julio Baghy
€ 6,00



PRETER LA VIVO
Julio Baghy
€ 4,80




LA VIVO KAJ MORTO DE VLADIMIR VARANKIN (1902-1938)
Nikolao Stepanov
€ 1,80



FIGRE PASAS LA NOKTO
István Nemere
€ 6,60

SUFERVOJO DE KNABINO



DE TAJGO AL MINARETOJ.
Aktorajo laŭ la taglibreto de Ada Sikorska-Fighiera. Jadwiga Gibczyńska. Rotterdam: UEA, 2000. 18p. 21cm. Prezo: € 3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Monodramo laŭ la taglibreto de la juna Ada Sikorska atestas pri kruelaĵoj de la dua mondmilito. Kiel 10-jarulino ŝi estis deportita al Siberio, de kie ŝi fine sukcesis reveni al Pollando tra Irano, Libano kaj Britio.



Kumeŭaŭa
Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. € 4,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ € 0,60 (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 19%). Triona rabato ekde 3 ekz.

KONTAKTO

kun la mondo!



KONTAKTO estas la plej vaste legata junuleca revuo pri landoj, popoloj, kulturoj, socio kaj politiko – por gejunuloj kaj ĉiuj kiuj estas junaj en la koro. **KONTAKTO** aparte taŭgas por instruistoj kaj komencantoj: parto de la artikoloj aperas en la lingvaĵoj "facila" kaj "tre facila". **KONTAKTO** estas varia kaj amuza – interesa por ĉiuj! **KONTAKTO** aperas 6-foje jare. Abonu rekte de UEA aŭ pere de via kotizperanto.

ABONTARIFO 2008

Aŭstralio	35 dolaroj	Francio	22 eŭroj	Nederlando	22 eŭroj
Aŭstrio	22 eŭroj	Germanio	22 eŭroj	Norvegio	170 kronoj
Belgio	22 eŭroj	Hispanio	22 eŭroj	Pollando	54 zlotoj
Brazilo	10 eŭroj	Israelo	16 eŭroj	Portugallio	22 eŭroj
Britio	15 pundoj	Italio	22 eŭroj	Svedio	205 kronoj
Danio	165 kronoj	Japanio	3300 enoj	Svislando	34 frankoj
Finlando	22 eŭroj	Kanado	31 dolaroj	Usono	26 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonon ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Eltendu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA! Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 2008 mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.

Heidi Suonuuti. El la angla trad.

Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke.

Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3.

21 cm. Prezo: € 5,40.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino estas multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj funkciulo de ISO, Internacia Organizaĵo por Normigado. La originalo estis verkita laŭ komisiono de Nordterm, asocio de terminologiaj societoj en Nordio.

STAFETAJ TEATRAĴOJ

Inter la legendaj eldonaĵoj de Stafeto estas ankaŭ kelkaj referencaj teatraĵoj. Por tiuj menciitaj ĉi-paĝe, la Libroservo de UEA proponas trionan rabaton por kiu ajn kombino de tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Oferto valida ĝis la 31a de aŭgusto 2008.

Hamleto, princo de Danujo.

William Shakespeare. Trad. L.N.M. Newell. Moderna traduko, kiu sukcesas transdoni la belecon de la originalo. La Laguna: J. Régulo, 1964. 252p. 22cm. Prezo: €9,00.



Somermeznokta sonĝo.

William Shakespeare. Trad. Kálmán Kalocsay. Petola, burleska am-kaj fe-rakonto en bele fluanta lingvaĵo. La Laguna: J. Régulo, 1967. 99p. 19cm. Prezo: €3,00.

La tempesto.

William Shakespeare. Trad. Kálmán Kalocsay. Unu el la lastaj, plej strangaj kaj potencaj ŝekspiraj dramoj. La Laguna: J. Régulo, 1970. 119p. 19cm. Prezo: €3,00.




Reĝo Edipo kaj Antigona.

Sofoklo. Trad. Douglas B. Gregor. Eleganta traduko de du klasikaj tragedioj, ege influintaj la eŭropan kulturon, form- kaj enhavfidela. La Laguna: J. Régulo, 1960. 216p. 22cm. Prezo: €6,60.

Topaze kaj La ŝipego

“Tenacity”. Marcel Pagnol/Charles Vildrac. Trad. Roger Bernard. La unua komedio pritraktas satire la valoron de la honesto en burĝa socio kaj la dua, la vivon kaj la sentojn de havena laboristaro. La Laguna: J. Régulo, 1960. 292p. 22cm. Prezo: €6,00.



Jozefo.

J.D. Applebaum. Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto. La Laguna: J. Régulo, 1957. 120p. 22cm. Prezo: €3,00.

Sonĝe sub pomarbo. Triakta

lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. Julio Baghy. Teatraĵo en versoj. La Laguna: J. Régulo, 1958. 221p. 22cm. Prezo: €10,50.

